

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Vilmos Benczik:
La facetoj de
tutmondiĝo**



**Kep Enderby:
UEA — ĉu
lingva asocio?**



**Interreto,
Interkulturo,
internacia lingvo**



Berlino: Sub flago tutmonda

Vi trovos...

141 Kongresa rezolucio

142 **Kongresa temo** Tutmondiĝo, ĉu por ĉiuj?

Vilmos Benczik

144 **Solena inaŭguro** Al jarcento de mult- lingveco kaj de Esperanto

István Ertl

Saluto de d-ro L.C.
Zaleski-Zamenhof

Saluto de K. Annan



146 **Strategia Forumo** Asocio ne nur lingva Dua paŝo al komuna strategio

Kep Enderby

Saluto de Federico Mayor



148 **Esperantologio** Per klavaro kaj ekranaro Akademio: Demandoj sagaj kaj saĝaj

Miroslav Malovec

A. Giridhar Rao

149 Revivu TEC

Laŭ Roland Rotsaert kaj Detlev Blanke

Tago de la lernejo

Interkultureco, sed ne aŭtomate

Jennifer Bishop

150 Kongresa panoramo

152 Rezulto de Belartaj Konkursoj de UEA 1999

Artaj aranĝoj

Sub la signo de romantiko

Franz-Georg Rössler

Amika etoso, fervora publiko

Kalle Kniivilä

Veroj pri la eterna infano

Trevor Steele

Zigzaguloj interpordas

Stefan MacGill

155 **Solena fermo** Post semajno memorplena

István Ertl

156 Kongresa kalejdoskopio

Kaj plue...

158 Notu bone Anoncetoj

159 Laste aperis

160 Forpasoj

La kovrilo: Internacia Arta
Vespero. (UEA / F. L. Veuthey)

Dekstra paĝo: La brazila grupo
Nova Erao allogas koridore.
(UEA / F. L. Veuthey)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establitita kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktotino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66;
USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informi-
gu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2100, 1/2 p. 1150,
1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera
kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja
ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.
Telefona: +31-10-436-1044.
Telefakso: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo:
Pasquale Zappelli.



KONGRESA REZOLUCIO

La 84-a Universala Kongreso de Esperanto, **kunvenanta** en Berlino, Germanujo, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1999, kun 2712 partoprenantoj el 66 landoj;

debatinte pri la temo "Tutmondiĝo – ŝancoj por paco?";

konstatinte ke la celo de la Internacia Lingvo Esperanto ekde la plej fruaj tempoj estas liveri al la mondo egalecan formon de komunikado, kiu konservas la etnajn lingvojn por ties utiligo interne de la diversaj regionoj, nacioj kaj etnoj, kaj per tio certigas eblon de egaleca partopreno por ĉiuj popoloj en la tutmondiĝa procezo, kaj samtempe ŝirmas la kulturen multkolorcon de nia terglobo;

analizinte la aktualan, ĉiam pli rapidan disvolviĝon de la tutmondiĝo, kiu tamen realiĝas laŭ modelo kiu kuntrenas la elĉerpon de la naturaj rimedoj de nia planedo, t. e. de nia heredaĵo al la postaj generacioj, kaj kiu alprenas en multaj rilatoj la formon de super-regado fare de la plej prosperaj landoj de la mondo, kaj sekve elvokas la fortiĝon de naciismo kaj apartiĝemo multloke, kio siavice endanĝerigas pacon;

notinte

– ke la internacia komunumo komencis alfronti tiun problemaron ekz. per la Konferenco de UN en Rio-de-Janeiro en 1992, en kiu partoprenis la E-movado,

– ke UN, Unesko kaj la aliaj instancoj de UN devas plu havi centran rolon en la komuna klopodo por ekologia sekureco, homaj rajtoj kaj justeco en la mondo;

alvokas

– al Unuiĝintaj Nacioj, al ties instancoj, al ĉiuj internaciaj forumoj, al la ne-registaraj organizaĵoj kaj al la uzantoj kaj parolantoj de Esperanto tra la mondo, doni gravan atenton al tiuj ĉi aspektoj de tutmondiĝo, kaj klopodi direkti la procezon tiel ke ĉiuj homoj de la terglobo profitu el ĝi. Tio povas okazi nur ĉe senkondiĉa respekto de ĉiuj homaj rajtoj, inkluzive de la rajtoj je lingva kaj kultura diverseco;

– al la ekonomie prosperaj kaj politike fortaj ŝtatoj celi ne asimilon de la cetera mondo sed unuiĝon kun ĝi surbaze de reciproka kompreno, respekto kaj reciprokaj avantaĝoj, ĉar nur tia tutmondiĝo povas garantii por la homaro solidan pacon en vera feliĉo.

Tutmondiĝo, ĉu por ĉiuj?

Paco ĉiam estis la ĉefa deziro de la homoj. Eblus dum horoj citi himnojn kaj artverkojn kiuj preĝas por ĝi. Pacon ni sopiras, ĉar ni scias ke malpaco naskas perforton, kiu ĉiam estingas homajn vivojn. Malgraŭ tiu praa sopiro la homaro praktike neniam ĝuis plenan pacon. Malpaco kaj milito ĉiam ekflamis tie kaj tie.

Tamen, hom-etologoj asertas ke homo biologie estas inter la plej toleremaj vivuloj: ĝi kapablas pli sukcese dividi vivareon kun siaj samspecianoj ol la plej multaj aliaj vivuloj. Malpacojn kaj militojn inter homoj generas ne biologie determinitaj instinktoj, sed enradikiĝintaj kulturaj stereotipoj. El tio sekvas ke atingi pacon ne estas maleble, kvankam — la spertoj instruas nin pri tio — malfacilege.

Nia kongresa ĉeftemo serĉas respondon al la demando “Tutmondiĝo — ĉu ŝanco por paco?”. Unue, estos utile iom ekzameni: kion entute ni komprenu sub *tutmondiĝo*?

Tutmondiĝo estas inter la plej diskutataj konceptoj nunaj. Oni plej malsame sintenas al ĝi, ĉefe pro ĝia multifaceteco, i.a. ekonomia (emfaze: financa), ekologia, psikologia, kultura, komunikada kaj, ne laste, politika. Por diversaj homoj tiu aŭ alia faceto povas ŝajni pli esenca, kaj onia opinio pri tutmondiĝo entute povas esti difinita de la rilato al tiu faceto.


Kapturna ritmo

Tutmondiĝo estas plurjarmila procezo seninterrompa, kies ritmo daŭre akceliĝis: dum la lastaj jardekoj ĝi atingis neniam spertitan, kapturman rapidecon. La nuna generacio devus en jardeko digesti pli grandan dozon da konsekvencoj de tutmondiĝo ol pli frue deko da generacioj kune.

La komenco de la tutmondiĝa procezo estis tiu momento kiam du triboj de prahomoj unue kontaktiĝis — ĉu paco ĉu milito — kaj komencis efiki unu al la alia. Tiu efikado certe estis reciproka, sed tute certe ne ekvilibra. Nome, tiu tribo kies anoj fajlis pli efikajn ilojn kaj provizis sin pli abunde per nutraĵoj, elradiis pli multe da efiko. En la historio ĉiam tiuj homgrupoj pli forte influis la aliajn kiuj pli kreskigis la efikecon de la homa laboro cele al materia bonfarto.

Tiu tendenco bone konstateblas jam ĉe la Romia Imperio, la plej frua klare videbla etapo de la tutmondiĝo. Ĝia formiĝo kaj daŭra kresko ŝuldiĝas al tio ke romianoj fruktuzis kaj pluevoluigis el la sciaro heredita de la grekoj la elementojn per kiuj povis plialtiĝi la materia nivelo de la homa vivo.

La disfalon de la Romia Imperio sekvis kontinua, silenta evoluo. Ne kreiĝis nova granda imperio, sed la tiamajn



Post la artikolo
“Tutmondiĝo —
ŝancoj por paco?”
(feb., p. 22)
de Vilmos
Benczik,
ni nun
publikigas
resumon
de lia
Berlina
prelego
enkonduka al
la kongrestemo.

eŭropajn ŝtatojn signife unuecigis komuna ideologio de la katolika eklezio, komuna skribsistemo kaj la latina lingvo. En la 15-a jc. maturiĝis la fruktoj de tiu evoluo: en la epoko de la geografiaj malkovroj la monda komerco etendis sian sferon, kaj, per la ekesto de kolonioj, Eŭropo ekinfluis teritoriojn multoble pli grandajn ol ĝi mem.

Tutmondiĝo kun vekrioj

La procezo de tutmondiĝo ĝis la komenco de la 20-a jc. disvolviĝis el Eŭropo — tio estis la koloniado. Ĝin abunde akompanis sango kaj vekrioj, suferoj kaj genocidoj, sed samtempe la ĉefaj elementoj de la eŭropa civilizo ekradikis en la koloniitaj teritorioj. Dum nur kelkaj jarcentoj eŭropaj ŝtatoj etendis sian potencon praktike al la tuta terglobo. La konkeritaj teritorioj kaj loĝantaroj estis kruele ekspluatataj; kelkloke, post plena ekstermo de la lokaj indiĝenoj, la ekloĝintaj eŭropaj enmigrintoj formis iom post iom proprajn ŝtatojn, unue iel ligitajn al la eŭropa kolonia potenco, sed tiuj ligoj iom post iom tute disŝiriĝis.

Unu el tiuj ŝtatoj estis Usono, fondita fine de la 18-a jc. Ĝi meritas atenton ĉar dum apenaŭ jarcento kaj duono ĝi trankuris vojon tiel brilan ke ĝi iĝis la plej riĉa kaj forta, unuvorte la plej sukcesa lando de la mondo. Jam de 50-70 jaroj la tutmondiĝa procezo disradias al la terglobo el tiu lando.

Tutan bibliotekon plenigus la erudiciaj analizoj pri la usona miraklo. Ĉi tie mi menciis nur la plej esencan komponanton: la efikegan organizadon de la homa laboro. La kreintoj de tiu lando konscie forbalais la balastajn tradiciojn, kaj komencis konstrui siajn socion kaj ŝtaton



De koloniado al "Koka-Koloniado" tutmondiĝo ŝanĝadas vizaĝon.

ekde la grundo, kaj — en la avangarda spirito de la klerisma epoko — ĉion ili faris surbaze de la racio. Distanciĝo disde la tradicioj ŝajne nepre antaŭkondiĉas efikan evoluon. Tiu ĉi kritika kaj racia rilato al la tradicioj estas la ĉefa virto kaj samtempe ĉefa malvirto de Usono. Virto: ĉar ĝi donis al Usono kaj ĝiaj loĝantoj mirindan liberecon, kreis favorajn cirkonstancojn por disvolvi la kreivon ĉe individuoj. Malvirto: ĉar ĝi rezultigis ian senradikecon kaj mal-kreskon de la homa solidareco. En Usono kvazaŭ betoniĝis la konceptoj de raciismo, revolucie novaj kaj utilaj antaŭ ducent jaroj, sed tiaj ke ne nepre utilas konsekvence apliki ilin ĉe nia intertempe multe pli fajna kaj nuanca mondbildo.

Nun ni provu, eĉ se nur supraĵe, prilumi kelkajn el la facetoj de tutmondiĝo.

Teknologio

Homoj ĉie en la mondo facile akceptas ĉi tiun faceton: verŝajne ĉar novaj teknikaĵoj kontribuis al la plikomfortiĝo de la homa vivo sen ke tuj sentebus iliaj negativaj efikoj.

Ekonomio

Ekonomio ĉiam ĉefmotoris la tutmondiĝan procezon. Ĝis antaŭ ĉ. 20 jaroj ĝia ĉeftereno estis la konstanta kresko de ekstera komerco interŝtata: varojn produktitajn de laboristoj kaj kapitalistoj en unu lando oni vendis al konsumantoj en alia. Tiam registaroj eĉ en la plej liberale regataj ŝtatoj povis decide influi la ekonomiajn procezojn. Esenca ŝanĝo venis meze de la 80-aj jaroj, kiam ĉe solida plua kresko de la ekstera komerco ekis vastaskale io tute nova: eksportado

de kapitalo. Kreiĝis enormaj multnaciaj entreprenoj, kiuj iom post iom ekpovis ne nur grandparte eviti influojn de la registaroj, sed eĉ mem influi tiujn. Jen grandegaj produkt-unuoj sen socia kontrolo, kiuj fakte ankaŭ minacas la bazan principon de merkata ekonomio — liberan konkuron.

Nova etapo de tiu procezo malfermiĝis en la lasta jardeko, post la falo de komunismo. Esence la sola funkcia ekonomia sistemo en la mondo restis merkatisma-kapitalismo. Ĝi ankoraŭ ne aperas ĉie kun unueca fizionomio, sed ĝia esenco ĉie estas la sama. Oni povas antaŭvidi ĝian baldaŭan plenan homogeniĝon, precipe pro la libera kaj rapida moviĝo de la kapitalo. La falo de komunismo sekvigis malavantaĝajn ŝanĝojn en la karaktero de kapitalismo: ŝrumpis en ĝi la solidarecaj elementoj.

Merkatismo certe estas la ekonomia sistemo kiu plej efike produktadas varojn aŭ organizas servojn ĝenerale. Sed lastatempe ĝi aperas ankaŭ en sferoj kie dubindas ĝia longperspektiva efikeco: en instruado, kulturo, san-servoj.

Ekologio

Ekologiaj damaĝoj ne konas landlimojn. Tial, evidente, ekologio estas la tereno kie plua disvolviĝo de tutmondiĝo estas rekte dezirinda: nur kun tre konscia kaj tutglobe unueca agado eblos eviti ekologian katastrofon. Sed pri la kielo de tiu agado mankas ĝenerala konsento: la interesoj de la evoluintaj landoj kontraŭas tiujn de la evolu-landoj.

Kulturo

Kulturo kaj produktado de kulturaj varoj estas en senpera ligo kun la teknika kaj ekonomia aspektoj, malgraŭ ke multaj volonte apartigus kulturon de la aliaj facetoj. Temas pri tio ke homoj laŭ sia intenco plej ĵaluze gardas la propran kulturon, tamen paradokse facile povas perdi ĝin. Lige kun tutmondiĝo, maleblas preteri la lingvan aspekton de kulturo. La angla lingvo en la internacia vivo jam nun havas neŝanceleblan pozicion, kaj post unu-du jardekoj ĝi eble komencos endanĝerigi la poziciojn de la naciaj lingvoj ankaŭ en ties landoj, ekzemple en la supera instruado.

Tutmonda dominado?

Nun ni provu difini la koncepton "tutmondiĝo", kaj ni vidu kia efektive estas la procezo okazanta en la mondo. "Tutmondiĝo" en si mem signifas ke la elementoj de la monda ekonomio ĉiam pli interdependas, ankaŭ produktado kaj distribuado de kulturaj varoj. "Tutmondiĝo" supozigus reciprokan interdependecon. Male, ni spertas ke ĉiam pli grandan parton de la monda ekonomia produktaro (ankaŭ kultura) posedas kaj regas ekonomiaj societoj registritaj en dudeko da plej evoluintaj landoj, ĉefe Usono. Fakte, estus pli adekvate paroli pri "tutmonda dominado" fare de tiu dudeko da landoj. En la historio, ĉefe influis ĉiam la pli evoluintaj landoj, dum la malpli evoluintaj ĉefe dependis. Tamen ĉe la tiama ritmo de la procezo tiu malegaleco plej ofte restis sub la tolersojlo de la homoj.

Tiu tutmonda dominado de Usono aparte okulfrapas ĉe la kulturaj varoj. Ĉi-terene suferas eĉ la evoluintaj landoj de Okcidenta Eŭropo. La filmoj projekciataj en tiu ĉi mondparto estas je 70% usonaj; la nombro de la spektantoj

daŭrigo sur p. 154

Al jarcento de multlingveco kaj de Esperanto

La tutmonda lingvo de danco pre-ludis al la kongres-inaŭguro de alia lingvo interhoma, kiam la bahaa dancensemblo Diverseco okupis la scenejon. Post tiu movoplena spektakleto la prezidanto de UEA, Kep Enderby, prezentis la podianojn. Apudis tie la kunordiganto de la kongresa temo, Vilmos Benczik; la prezidantoj de la Akademio kaj de Germana E-Asocio, Geraldo Mattos resp. Franz Stocker; eks-membro de Eŭropa Parlamento, ano de la Honora Komitato, Christof Tannert; konsilanto de Loka Kongresa Komitato, Werner Bormann; la kompleta estraro de UEA (GBEGLO Koffi, Renato Corsetti, Kep Enderby, Michela Lipari, Kalle Kniivilä kaj Petro Chrdle); ĝenerala direktoro Osmo Buller; la rektoro de Internacia Kongresa Universitato, Reinhard Selten; kaj TEJO-estrarano Sjoerd Bosga.

Nome de LKK, salutis denaska berlinano Werner Bormann, aludante la ĉiean "konstruan etoson de Berlino". Poste Franz Stocker alvokis: "ni ĉiuj estu berlinanoj kaj Berlino estu esperantista".

"La Espero" stare kantata. Supre, de maldekstre, salutas Riffa Hämäläinen el Finnlando, ALTANCEĜEG Mjagmar el Mongolio kaj Rubén Diaconu el Argentino.

GBEGLO Koffi laŭtlegis mesaĝon de "alia Kofi": la Ĝenerala Sekretario de UN, Kofi Annan, vortumis sian lastan salutfrazon rekte en Esperanto. (Vidu dekstre.) Petro Chrdle voĉigis saluton

de Federico Mayor, Ĝenerala Direktoro de Unesko. (Vidu p.147.)

Christof Tannert — unu el la eŭro-parlamentanoj "opiniantaj ke E-o povus iel helpi solvi la lingvan proble-

Bonvolu akcepti miajn tradiciajn, sincerajn

salutojn al vi ĉiuj, kunvenintaj por kongresi en Berlino, urbo kies ĉiu ŝtono ŝajnas grave ŝarĝita de historio; urbo kie oni iam ordonis ke Esperanto malaperu, sed urbo kiu fariĝis por la semajno venonta la ĉefurbo de Esperantujo; urbo de kie oni iam estris la holokaŭston de hebreej, sed urbo kiu post kelkaj tagoj simbole transdonos la verdan standardon al la amikoj en Tel-Avivo.

Vi kunvenis por debati pri signifoplena temo, elektita por via kongreso: pri la tutmondiĝo kaj pri ŝancoj por paco. Temo perfekte adekvata al la loko de la venontaj debatoj kaj al la komunumo debatonta:

— komunumo de pacaj batalantoj, kiuj kolektiĝas esperante detruiri murojn de miljaroj, starantaj inter la popoloj;

— urbo kie falis la muro popolon dividinta, kaj la eĥo de tiu evento sonis tra la mondo kaj inaŭguris falon de muro virtuala, dividinta la homaron en kampojn malamikajn.

Ĉi tie do, fare de dissalto de la Berlina muro, startis la efektivigado de la ideo de tutmondiĝo, ideo konkretiganta la sonĝon pri granda rondo familia de popoloj, kantatan en nia himno "La Espero".

Okazis hazarde ke antaŭ dek jaroj, ĝuste kiam la unuaj truoj aperadis en la muro de la honto, mi troviĝis en Berlino, ankaŭ por aferoj de Esperanto, invitate de Helmar Frank al AIS-kunveno ĉi tie. Mi tiam travivis vere solenan momenton. En la etoso ĝenerala, ene de la aro de entuziasmuloj, mi trapadis per marteletoj, ie trovita, kontraŭ la muro, konvinkita kontribui tiamaniere al la "dissalto de obstinaj baroj..." Observante la falon de la muro mi havis la impreson esti vida atestanto de la fino de epoko kaj de la naskiĝo de nova, pli feliĉa jarcento alproksimiĝanta, kvankam la vorto *tutmondiĝo* ne loĝis ankoraŭ en mia cerbo.

Tamen mi baldaŭ komprenis ke la gravaj problemoj kiuj ekaperas, aŭ reaperas, en tiu feliĉa estonto, fariĝinta seniluziiga nuntempo, postulas tutmondskalajn solvojn. Ĉu tiaj solvoj, ĉu la "tutmondiĝo" estas "ŝanco por paco"? Mia respondo estus: *ne* — ĝi ne estas ŝanco por paco, ĝi prezentas al paco *kondiĉon necesan!*

Ĉar se hodiaŭ ne plu ekzistas muro inter iama Oriento komunista kaj Okcidento kapitalista, tamen limo ekzistas inter Nordo riĉa kaj Sudo malsatanta. Do la dissalto de tiu baro ene de mondscale organizota ekonomia ekvilibro estas kondiĉo de paco, ĉar daŭra paco ne estas antaŭvidebla inter satulo kaj malsatulo. Tiel etnaj konfliktoj kiel religiaj bezonas solvon pere de mondskala organizo. Kaj la senlaboreco en nia kontinento, samtempa al grava manko de laborenergio por protekti landojn kontraŭ naturaj katastrofoj aliloke; ĉu tio ne bezonas mondskalajn solvojn? Same kiel protektado de la kulturaj diversecoj, protektado de lingvoj, eĉ tiuj parolataj de etaj grupoj, vehikloj de tia diverseco, lingvoj al kies konservado la neŭtrala lingvo internacia devas kontribui. Kaj fine, sed eble plej grave, la protekto de nia medio, kondiĉo necesa al la daŭrigo de ekzisto de nia mondo, certe ja bezonas tutmondskalan disciplinon!

En la nomo de la familio Zamenhof kaj ankaŭ en la nomo de la Fondumo Zamenhof, kreita dum la lasta jardeko en la naskiĝurbo de mia avo, Bjalistoko, mi deziras plenan sukceson al la 84-a Universala Kongreso de Esperanto. Esperanto, vehiklo de la universala *toleremo*, fundamenta valoro de interhomaj rilatoj, *toleremo* signifanta respekton de la diverseco, de la alieco, tial do necesa faktoro de sukcesa funkciado de la *tutmondiĝo*.

D-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof



Out fotoj: UEA/F. Vauthier

maron en Eŭropa Unio” — atentigis ke pli larĝa EU praktike ne povos konservi sian nunan lingvoreĝimon. Laŭ li multlingveco ja subtenindas, sed nur komuna dua lingvo povas, el vidpunkto socia kaj politika, juste solvi la lingvoproblemon.

Post la salutparolado de Louis C. Zaleski-Zamenhof (maldekstre), sekvis mallongaj salutoj de eminentuloj. Afablajn vortojn sendis la Alta Protektanto Roman Herzog, eksa prezidento de Germanio; Helmut Kohl, antaŭa germana kanceliero; Hans-Dietrich Genscher, iama ministro pri ekstero; Peter Radunski, Berlina senatano; Manfred Stolpe, ĉefministro de Brandenburgio; Bodo Manegold, urbestro de la Berlina distrikto Neukölln (sur kies placo Esperanto oni inaŭguris la 3-an de julio memortabulon ĉe Zamenhof-kverko); la germaniaj ambasadoroj de Britio, Ĉeĥio, Estonio, Finnlando, Hungario, Israelo kaj Norvegio; la ministrino de Kroatio pri scienco kaj kulturo, Mirjana Bohanec-Widowiĉ; kaj Kulturunuigo de Prenzlauer Berg (alia Berlina distrikto). En la vicoj de la publiko ĉeestis itala ataŝeino, Clara Bencivenga.

Unu kongresano ricevis apartan omaĝon: Osmo Buller salutis la plej aĝan Berlinan esperantiston, la 98-

jaran Karl Maier, kiu ekstare akceptis la aplaŭdojn. Buller gratulis ankaŭ al la forestanta Honora Membro Bruno Vogelmann, kiu 90-jariĝis unu tagon antaŭ la komenco de la UK.

Enkondukante la kongresan temon, Vilmos Benczik emfazis ke esperantistoj, ja fruaj apostoloj de tutmondismo, devas aŭdigi sin en la ĉi-tema debato. (Vidu detale sur p. 142.)

Michela Lipari anoncis la nomojn de la novaj Honoraj Membroj de UEA: Petras Čeliaskas (Litovio), Aldo de’ Giorgi (Italio), Hristo Gorov (Bulgario, intertempe forpasinta), Baldur Ragnarsson (Islando) kaj YAMASAKI Seikō (Japanio) estos biografie prezentitaj venont-numere.

Antaŭ la oficiala kongres-malfermo, ni aŭdis festparoladon de Enderby. Li trafte vortigis la konvinkon ke lingvaj problemoj estas konsiderendaj ne aparte de, sed ĝuste sine de la cetera mondproblemaro. Detalan elvolvon de liaj ideoj eblis



Michela Lipari sub flagoj monda, eŭropa, germana kaj Berlina

poste aŭdi en la kunsido de la Strategia Forumo de la E-komunumo (vidu p. 146), en parolado kiun li faris kiel prezidanto de Esperanta Jura Asocio.

Nome de TEJO salutis Sjoerd Bosga. Bondeziris al la kongreso ankaŭ la prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT, Yves Peyraut.

La tradician kantadon de “La Espero” antaŭis la plej bunta ero de la inaŭgura solenaĵo: salutoj el la granda plejparto de la 66 landoj reprezentataj en la Berlina UK. Aperis inter ili gastoj kiujn ni vidas malofte, sed des pli volonte: samideanoj el, ekzemple, Armenio, Gvatemalo, Kazahio, Mongolio, Taĝikio kaj Tanzanio.

István Erti



Kun plezuro mi

sendas bondezirojn al la 84-a Universala Kongreso de Esperanto. Vi kunvenas je la fino de tumulta jar-

cento, kiu atestis je la pintoj kaj la abismoj de la homaj kapabloj. Multaj mondaĵoj evoluoj rajtas ankoraŭ nin dubigi kaj maltrankviligi. En unu regiono disvastiĝas paco, en alia ekfuriozas genocido. Sen-egala lukso apudas teruran malriĉon — la staton en kiu restas kaptita kvarono de la monda loĝantaro. Tutmondigo nin enretigas ĉiam pli dense, dum maltolero nin plu disigas. Ĉiu progreso estas necerta; la defioj kiujn ni frontas, fariĝas ĉiam pli kompleksaj.

Hodiaŭ la monda tagordo postulas de la ŝtatoj novajn ideojn, novajn rimedojn, novajn politikajn engaĝojn. Pli kaj pli ofte montriĝas ke la problemoj komunas. Inter la minacoj troviĝas kelkaj bone videblaj: terorismo, pandemioj, amasarmado. Aliaj insidas kaŝe: klimata ŝanĝo, narkotkomerco, la “lavado” de ŝtelita mono. Ĉiuj ignoras landlimojn; ili estas “problemoj sen pasportoj”. Neniu lando sola kapablas ilin forbari. Tial ĉiu lando bezonas Unuiĝintajn Naciojn.

En tia ĉiam pli interplektita mondo, konstrui la pacon — kaj batali kontraŭ minacoj al la paco — postulas la partoprenon de ĉiu civitano kaj ĉiu lando. Diversmaniere kontribuas al tio la registaroj, ne-registaraj organizoj, komercaj entreprenoj, akademiaj institucioj, sindikatoj, virinaj asocioj k.m.a. En la lastaj jaroj, tiaj diversaj fortoj de la civila socio — la socio en kiu neniu rajtas sola kaj senkontrolde decidi pri komunaj aferoj — montris sin ĉiam pli aktivaj je la nacia kaj internacia skaloj. Tio estas tre pozitiva evoluo, ĉar ĝi helpas respondecigi la registarojn kaj instigas homojn al kunkcedado pri temoj kiuj rekte tuŝas iliajn vivojn.

Ĉe Unuiĝintaj Nacioj, ĉiuj ĉi kunrolantoj povas kuniĝi en komuna klopodo: por ekologia sekureco, por homaj rajtoj, por justeco, kaj tiel plu. UN daŭre prezentas malfermitan pordon al vivinda estonteco, praktikan forumon por la efika kunsolvado de mondaĵoj, surbaze de la universalaj idealoj listigitaj en la Ĉarto. Kiel instruas afrika proverbo: “La Teron ni ne posedas, sed prizorgas por la posteuloj”. Je ĉi tiu historia momento, plena de esperigaj ebloj, mi dediĉis min al la konstruado de nova fundamento el paco, progreso kaj evoluo, en la kadro kaj per la helpo de Unuiĝintaj Nacioj. Tian devon, al la nuntempo kaj la estonto, nun frontas ni ĉiuj. *En tiu spirito, mi deziras al vi plenan sukceson.**

Kofi Annan,

Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj

**Frazo Esperantlingva en la originalo.*

Asocio ne nur lingva

En sia kvalito de prezidanto de Esperanta Jura Asocio, Kep Enderby faris paroladon en la Berlina kunsido de la Strategia Forumo de la Esperanto-komunumo. Jen redakcia resumo.

La ĉefa, kvankam ne sola celo de UEA, laŭ la statuto, estas lingva: “3 (a) Disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto”. Tamen UEA havas ankaŭ aliajn celojn: “3 (c) plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo; 3 (ĉ) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.”

Se Esperanto estas bona ideo, kial la tutmonda esperantistaro, malgraŭ multaj jaroj da heroa strebado, ne pli bone sukcesigis ĝin? Inter aliaj kaŭzoj mi volas provi identigi tiujn kiuj estas ne ofte diskutataj, eĉ iomete tabuaj.

UEA estas unu el miloj da neregistraj organizoj en la mondo. Ĉiu havas proprajn celojn por plibonigi la mondon. Iuj sukcesas multe pli ol aliaj, ol — oni devas diri — UEA. Kial?

Organizoj kiel Greenpeace kaj Amnestio Internacia sukcesas ĉar ili kaptas sufiĉe grandan porcion, aŭ niĉon, de la tutmonda merkato por siaj “varoj”: protektado de la natura medio, resp. de politikaj malliberuloj kaj postulo de justeco por ĉi tiuj.

La niĉo por nia varo, la lingvo Esperanto, ŝajnas kompare ne sufiĉe granda. UEA kaj ni ĉiuj devos pligrandigi nian merkatan porcion.

Alia parenca faktoro estas ke anoj de la E-komunumo ne malofte donas la falsan impreson ke, uzante apartan lingvon, ili volas apartigi sin de aliaj. Dum ni koncentriĝas al la solvo de la lingva problemo pere de E-o, ni tro malatentas nelingvajn aferojn. Tial ni ne interesas tiujn kiuj ne havas saman

Dua paŝo al komuna strategio



De dekstre: Helmar Frank kaj Kep Enderby, ĵus veninte el la Strategia Forumo, rakontas dum la urba akcepto al Osmo Buller.

La Forumo ne estas aranĝo de UEA, sed en Montpeliero oni interkonsentis ke UEA zorgu pri la preparado de la dua kunsido. Petro Chrdle, estrarano pri faka kaj scienca agadoj, dissendis centon da invitoj al ĉiuj konataj E-organizaĵoj, tiom diversaj ke ilia sola komuna trajto estas uzi Esperanton kiel laborlingvon. Pli ol 50 tiaj establoj sendis siajn reprezentantojn al Berlino.

Post mallonga enkonduko de Chrdle, tri prelegoj prilumis la situacion el malsamaj anguloj: prof. Helmar Frank (estro de Akademio Internacia de la Sciencoj) el vidpunkto scienca, kultura kaj politika, Franz Josef Braun (prezidanto de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) ekonomie kaj industrie, kaj fine Kep Enderby (nome de Esperanta Jura Asocio) el vidpunkto jura (vidu maldekstre).

La sekva vigla diskuto fokusigis al la temo de komuna strategio: unu opiniis ke ties manko kaŭzas stagnadon de la esperantistaro; alia pledis por engaĝiĝo emfaze politika; tria vidis tro grandan breĉon inter niaj celoj kaj

lingvan orientiĝon kiel ni, kaj ni ofte aspektas al ili kiel stranga sektro lingva.

Alternativo estus ŝanĝi la emfazon en nia laboro, ne por redukti la lingvan flankon, sed por agi pli amplekse pri aliaj temoj, kiuj fundamente estas la kialoj pro kiuj ni uzas Esperanton. Alivorte, ni ŝanĝu la emfazon inter la celoj por-Esperanta kaj per-Esperanta.

Ĉu tio kontraŭas la neŭtralecon de UEA?

La statuto de UEA estas ambigua. Nome, §5 rilatigas neŭtralecon ankaŭ al “sociaj kaj politikaj problemoj”.

§5 ankaŭ kaj egale grave diras ke “respekto de la homaj rajtoj, tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj... estas por la laboro de UEA esenca kondiĉo”.

Jen la ambigueco: UEA devas agi neŭtrale rilate al sociaj kaj politikaj problemoj, kaj samtempe strebi al la celoj en §3c kaj §3ĉ, kaj ĉiam celante plibonigon de homaj rajtoj ĉie. Sed §3c kaj §3ĉ kaj demandoj pri homaj rajtoj ofte kuntrenas sociajn kaj politikajn problemojn ĉe kies pritrakto oni ne povas facile ĉiam resti neŭtrala.

Post sia unua kunsido en Montpellier (vidu sep. '98, p. 158), dum la Berlina UK kunvenis por la dua fojo la Strategia Forumo de la Esperanto-Komunumo.



UEA / F. Vauthier

rimedo; kvara bedaŭris supozatan perdon de nia iama avangardeco.

Ĉar tempo draste mankis, fine naskiĝis la decido daŭrigi la diskuton unue pere de starigota retforumo (E-organizaĵoj kontaktu chrldle@kava-pech.cz, ankaŭ se ilia reprezentanto ne partoprenis en Berlino), kaj poste en kunvokota tria kunsido, kiu daŭru minimume 4 horojn.

La aktoj de la dua kunsido aperos kajforme, kun la prelegoj, resumoj de la ceteraj kontribuoj kaj listo de la partoprenintaj E-organizaĵoj.

Iuj timas ke, se UEA komentus kaj agus pri “sociaj kaj politikaj” kaj homrajtaj problemoj, aldone al la lingva problemoj, tio povus krei polemikon, ĉagrenon, eble splitiĝon de la movado kaj eĉ de UEA mem.

Tamen Greenpeace kaj Amnestio akceptas tiajn polemikojn kaj, laŭ iuj, tiaj diskutoj plifortigas tiujn asociojn.

Ĉu helpus aŭ malhelpus al UEA en la aktuala mondo havi siajn manojn iomete pli liberaj?

Lastatempe UEA pli kaj pli asertas sin parto de la tutmonda pacmovado,

kaj neniu plendas ke tio kontraŭas la neŭtralecon. Ĝi eldonas librojn favore al paco kaj homaj rajtoj, ĝi intencas pli kaj pli engaĝi sin en programoj kiel Kulturo de Paco de Unesko ktp.

Ero en la aktuala politiko de UEA, pri kiu mi mem respondecas, estas atingi pli proksiman kunlaboron kun aliaj NRO-j ĉe Unesko. Kiel fari tion utile, se nia interpreto de la neŭtraleco malhelpus tion? Kiel responde prizorgi la eksterajn rilatojn de UEA, se ni devus konstante eviti polemikon?

Se en diskutoj oni devas limigi sin al la lingva demando, oni rapide renkontas enuon kaj interesmankon ĉe la aŭskultantoj. Iom helpas antaŭenigi la argumenton ke la uzado de E-o helpus lingve plijustigi la mondon. Sed ĉu tia argumento sufiĉas?

Ĉu UEA devas resti organizo unuavice lingva-kultura, aŭ engaĝi sin pli kaj pli en la aferojn de la nuna mondo, alianco kaj kunlabore kun aliaj organizoj, eĉ se per tio ni riskas partopreni en diskutoj — tiom neŭtrale kiom eblas — pri “sociaj kaj politikaj problemoj”?

Se la lingva problemoj en si mem, al kiu ni ofertas E-on kiel solvon, ne sufiĉas kiel bone vendebla varo por logi aĉetantojn kaj gajni pli grandan niĉon en la tutmonda kulturmerkato, kie UEA devas konkurenci kun multaj aliaj NRO-j kaj interesoj, kion do ni devas fari?

Ĉu nia afero prosperus pli bone, se Esperanto estus “vendata” en pakaĵo komuna kun nuntempe pli bone “vendeblaj varoj”, ekzemple homaj rajtoj? Alie: ĉu ni donu pli da emfazo al la per-Esperanta aspekto de niaj laboroj?

Mi proponus ke UEA, pli senambigue ol ĝis nun, direktu sin al la protekto kaj progresigo de homaj rajtoj ĝenerale. Celoj de civilaj liberecoj, se vi preferas tiel nomi ilin. Kompreneble, tio inkluzivus la egalecon de lingvaj rajtoj kaj la rolon de E-o en ilia egaligo.

Se UEA irus laŭ tiu vojo, ĝi povus pli ol nun diskonigi en la mondo, kun reputacio de asocio por homaj rajtoj kaj civilaj liberecoj, anstataŭ la nuna reputacio de nur lingva asocio. UEA iĝus asocio por la homaj rajtoj, kiu uzas Esperanton, kaj kies politiko estus disvastigi Esperanton pli forte ol nun pere de ĉefa pledo pri homaj rajtoj aŭ, se vi preferas, civilaj liberecoj.

Tion mi sugestas.

Saluto de Unesko



Kun granda plezuro mi sendas bondezirojn al la partoprenantoj de la 84-a Universala Kongreso de Esperanto. Via kongreso pritraktos la problemojn de tutmondiĝo, paco kaj lingva diverseco. Tiuj temoj ja centre rolas en la programo de Unesko, kaj ne eblas troaksi ilian gravecon en la ĉiutaga vivo de homoj tra la tuta mondo.

Starigante la demandon “Tutmondiĝo — ŝancoj por paco?”, via kongreso enfokusigas du aktualajn aspektojn de la homa kunkompensado kaj kunagado. Unue, temas pri la eterna problemoj de ĉiuj civilizacioj — kiel certigi la pacon; due, temas pri reganta socia evoluo fine de la 20-a jarcento, nome tutmondiĝo. Pro tio ke paco, evoluo kaj demokratio formas nedisigblan triangulon, necesas konsideri kiel demokratio rilatas al tutmondiĝo, kaj kiel tutmondiĝo influas la socian evoluon ĝenerale kaj precipe la kulturen evoluon.

Kiel sian mision Unesko alprenis la celon “konstrui la defendojn de la paco” en la mensoj de ĉiuj homoj. Ĝuste tial, nia Organizo direktas sian agadon al la konstruado de kulturo de la paco. Tiucele ni fondis la projekton LINGUA-PAX, kun la devizo “Paco per la lingvoj”. Per plurlingva edukado kaj la subteno de lingva kaj kultura diverseco, ĝi celas fortigi la kredon kaj volon je paco inter la lernantoj.

Interparolante, homoj lernas kompreni unu la alian kaj praktiki la moralan solidarecon, sur kiu baziĝas ĉiu vera integriĝo. En tia aliro efektive kuniĝas la idealoj de d-ro Esperanto kaj tiuj de Unesko. Ni dividus vizon pri vera tutmondeco, preter la tre limigita tutmondiĝo ekonomia de la merkatoj. Niajn esperojn pri la estiĝo de tutmonda homa komunumo ni bazas sur la plej altaj valoroj de la homa kulturo, tiu transcenda elmonro de la homa spirito. Pro tio ke kulturon oni esprimas unuavice lingve, interkompreniĝo per la reciproka studado de lingvoj daŭre konsidereblas kiel unu el la plej bonaj rimedoj por kunkonstrui kulturon de la paco.

Ni renovigu niajn strebojn por certigi ke la tutmondiĝo inkluzivu ankaŭ tiun ĉi dimension: senkondiĉan respekton al kultura kaj lingva diverseco. Se ni sukcesos ĉi-rilate, tio siavice naskos novajn ŝancojn por plifortigi la pacon kaj plibonigi homajn vivojn.

Mi deziras al vi sukceson en ĉi tiu lasta kongreso de la jarcento, kaj atendas kun intereso la raporton pri viaj diskutoj.

*Federico Mayor,
Ĝenerala Direktoro de Unesko*

Per klavaro kaj ekrano

La Esperantologia Konferenco okazis sub la gvido de Marc van Oostendorp (Univ. Amsterdamo) en salono plenplena de aŭskultantoj.

Unue Christer Kiselman (Univ. Upsalo) prezentis revivigon de la revuo *Esperantologio* — *Esperanto Studies*. [Vidu p. 159.]

Ilona Koutny (Univ. Mikiewicz, Poznań) detale priparolis la komputilajn eblojn helpi leksikografian laboron, per ekzemploj el *Hungara-Esperanta meza vortaro* (vidu jul.-aŭg., p. 134; nun ankaŭ kompaktdiske). Ŝi substrekis la signifon de korpusoj (ampleksaj kolektoj de elektitaj tekstoj) por la E-leksikografio: ilia komputila prilaboro povus dokumenti la efektivan lingvouzon (oftecon kaj kombinon de vortoj, ilian gramatikan konduton) ĝenerale aŭ en la koncerna ĝenro. En E-o korpusoj de parolata lingvo tute mankas.

Miroslav Malovec (Ĉeĥio) klarigis la gravecon de enkomputiligado de libroj, eĉ jam eldonitaj, por ke ili transvivu spite ke Esperantujo ne havas tiom da muzeoj kaj publikaj bibliotekoj kiel nacilingvujoj.

Helga Farukuoye prezentis la komputilan prilaboron de la biblioteko de Internacia E-Muzeo Vieno, parto de ŝtata muzeo. Ŝi jam enigis ĉ. 4300 el la 21 000 titoloj (http://www.onb.ac.at/online_s/esperanto/espdb.htm): vizitinde, por ke ĝi ne ĉesu pro interesmanco.


En posta tago seminario pri “Lingvoj en Interreto” siamaniere daŭrigis la konferencon.

Van Oostendorp esprimis zorgon ke la premo de ŝtatoj kaj entreprenoj volantaj “eviti kaoson” povus konduki al ekskludo de privatuloj el aktiva kontribuado al la reto. Alia danĝero venas el la privilegia pozicio de la angla lingvo. Tamen, li tenas la idealon “ke iutage oni trovos en Interreto informojn en kaj pri sesmilo da lingvoj”.

Martin Haase (Libera Univ., Berlino) priskribis la uzon de la germana en la reto. Ofte buŝaj parolantoj klopodas uzi literaturecan lingvaĵon, dum retaj diskutejoj strebas imiti per skribaj rimedoj la familiarecon de neformala buŝa interparolo: ridon, ploron, krimon, kison, emfazon, oscendon. Kelkaj mallongigoj jam penetris en la normalan buŝan lingvon.

Koutny prelegis pri E-o en Interreto, informante pri Virtuala Esperanta Biblioteko, Flavaj paĝoj, Adresaro de rete atingeblaj e-istoj, diskutejoj kaj hejmpaĝoj, vortaroj, literaturo kaj instru-programoj. Samtempe ŝi atentigis pri misaĵoj aperantaj en la reto, ekz. nepetitaj reklamoj kaj malzorga stilo retletera, kiu povas misinflui infanojn.

Miroslav Malovec - Ĉeĥio



Akademio: Demandoj sagaj kaj saĝaj

“Ni ekzistas nur ĉar *vi* ekzistas.” Per tio Geraldo Mattos, prezidanto de Akademio de Esperanto, invitis ĉiujn sagi siajn demandojn kaj klarig-petojn al la dek kvin akademianoj sur la podio. La podianoj ne nur prezentis sin, sed danke al d-rino Boulton, plej multaj ankaŭ rivelis ĉu ili posedas katojn!

Poste ni aŭdis pri akademia kolokvo en Zagrebo en 2001 (Spomenka Štimec), pri utilaj kaj senutilaj demandoj senditaj al la lingva konsultejo de la Akademio (Stefan Maul) kaj pri kelkaj historiaj facetoj de la Akademio (Carlo Minnaja). “Ĉu la lingvo disdialektiĝas?” demandis iu. “Ne”, respondis akademiano Moon, “temas ne pri disdialektiĝo sed eble evoluo de la lingvo”. Moon ankaŭ konsilis uzi la iksan konvencion en Interreto.

Plena Ilustrita Vortaro estis alia pridemandaĵo. Oni plendis pri la alta prezo de PIV kaj demandis kiam estos alirebla TTT-versio de tiu vortaro. En sia respondo Amri Wandel menciis ke almenaŭ *Hejma vortaro* jam estas konsultebla rete, konstruita el laboro de la anoj de la Interreta listo “DENASK-L”. (Red.: Papera eldono de *Hejma vortaro* baldaŭ aperos ĉe UEA.)

A. Giridhar Rao - Barato

Novajo ĉi-jare estis la kongresero “Akademianoj parolas”. Prelegis prezidanto Geraldo Mattos (“Kion vere signifas niaj participoj?”) kaj Ilona Koutny (“Ĉu niaj radikoj havas karakteron?”). Malgraŭ la malfacilaj gramatikaj temoj, la granda nombro de alvenintoj kaj la diskutoj post la du prezentoj atestis pri intensa intereso ĉe la kongresanoj. (Laŭ gazetara komuniko de la Akademio)

Revivu TEC

Cirkaŭ 90 homoj aŭskultis la raportojn de terminologia kunveno sub gvido de la UEA-estrarano pri faka agado, Petro Chrdle. Parolis:

— Wera Blanke (Germanio) pri la terminologia evoluo en E-o ekde 1909, kiam Internacia Scienca Asocio E-ista establis terminologian komisionon, ĝis la fondo (1987) kaj posta lamiĝo de Terminologia Centro (TEC) de UEA;
— Christer Kiselman (Svedio) pri sia revizia kunlaboro pri matematiko kaj

statistiko por la nova eldono de PIV;
— Lluís de Yzaguirre (Katalunio, Hispanio) pri la rolo de teknologio en la estonteco de lingvoj kaj la neceso ke Esperanto estu konsiderata ĉe novaj lingvaj teknologioj kaj produktoj (ekz. voĉrekono kaj voĉregataj komputiloj);
— Karl-Herman Simon (Germanio) pri la forsta terminaro *Lexicon Silvestre*;

— István Gulyás (Hungario) pri *Fervoja terminaro* de Internacia Fervoja Unio, kies elektronika versio en 1997 ekzistis jam en 14 lingvoj.

En la diskuta parto la germana studentino Sandra Schweder prezentis sian diplom-disertaĵon “Evoluo kaj

akcepto de teknikaj terminologioj en la planlingvo E-o”, en kiu ŝi analizas fakterminarojn, i.a. pri komputado, kaj konklude forte pledas por kompetenta kaj pli aktiva planado kaj terminologia normigo en E-o. Detlev Blanke (Germanio) kaj Rüdiger Eichholz (Kanado) instigis konservi jamajn terminologiajn atingojn; same Blanke kiel Jan Werner (Teknika Univ. de Brno, Ĉeĥio) insiste rekomendis ne malfondi TEC.

Oni revivigu TEC kaj regule enprogramigu terminologian konferencon ĉe ĉiu UK — resumis Chrdle.

*Laŭ Roland Rotsaert (Ret-Info)
kaj Detlev Blanke*

Tago de la lernejo

Interkultureco, sed ne aŭtomate

En sia enkonduka prelego (“Kiel Esperanto povas kontribui al interkultura edukado?”) Mauro La Torre, prezidanto de ILEI, starigis la demandon: kion signifas “tutmondigo” en la kampo de edukado? Ni, en ILEI, rifuzas ke tio estu la alpreno de unusola (usona) kulturo, kun perdo de alilokaj kulturoj. Male, ni volas eduki al kono, respekto kaj aprezo de la kulturoj de aliaj, kulturoj kiujn ni konsideras principe egalrajtaj. Krome ni proponas la uzon de E-o kiel lingvo “kupola”, kiu protektas la ekziston de ĉiuj etnaj lingvoj kaj kulturoj.

Günter Lobin (Univ. Paderborn) donis, laŭ tradicio, priskribon de la kongreslanda edukistemo. La TV-kurson *Esperanto, pasporto al la tuta mondo* prezentis aŭtoro Paul Gubbins kaj projekt-estrino Lusi Harmon. Pedagogiajn helpilojn de ILEI priskribis Stefan MacGill.

Rondtablan diskutadon iniciatis la profesiaj instruistoj La Torre, Gubbins, MacGill kaj Elisabetta Vilisics-Formaggio, pri la signifo de *eduki*, *kulturo*, *interkultura edukado*. Pri E-o ni demandis nin:

1. Ĉu ĝia lernado helpas al interkultura edukado, kaj ĉu fakte la E-parolantoj estas (meze) interkulture pli malfermitaj ol iliaj samlandanoj?

2. Kiuj ecoj de nia lingvo eventuale faciligas interkulturan malfermiĝon?

3. Kiom niaj lernomaterialoj estas etnocentraj kaj kiom interetnaj?

4. Kion fari por plibonigi niajn lernilojn en la dua direkto?

Per viglaj aludoj al propraj spertoj, profesiaj kaj kiel lernanto, la podiano konstatis ke edukado per lernado de E-o ja kontribuas multe al ĉies interkultura edukiĝo, sed — laŭ Stefan MacGill — ne aŭtomate. “Tradiciaj dulingvaj adaptaj de kutimaj lerniloj ne donas multon sed prenas la nacian ŝablonon”. Kulturaj tradicioj ŝanĝiĝas rapide, tiom ke priskriba teksto en lernilo de

ajna lingvo baldaŭ eksmodiĝas. Necesas konscii ke la nunaj lernantoj mal multe legas, por multaj la reala mondo estas tiu televida, eĉ komputil-ekrana.

La Torre daŭrigis sian enkondukon al nova projekto de ILEI, Interkulturo (v. jun., p. 101), per la propono ke oni konsideru uzon de informoj rekte el alia kulturo. Interkulturo kreos i.a. libron pri geografio kun aŭtoroj el la lando mem. Kompreneble leviĝos demandoj pritrakteblaj pli efike kaj rapide per Interreto ol per kutima libro.

Jennifer Bishop, estrarano de ILEI



**Gvidas
Jennifer
Bishop.**

**Estrarano
de ILEI,
Carla de Lorenzi**

Fervora foliumo
en la Libroservo



Plurnacia
vojserĉado



Momentoĵ eternaj
kaj... aĉeteblaj



kongresa



Anino de LKK,
Ina Tautorat
pli facile
spiras ĉe
la fino.



Barbara
Kellerbauer
kantas
Brecht-
kanzonojn.



Dua Nitobe-Simpozio

- konatoj: aspekto, voĉo, konduto, scio
- nekonatoj:
 - posedo: legifinto, rekomenĝa letero, ktp.
 - scio: pasvorto, PINo, ktp.
 - kapablo
 - korpa eco: fingrolineoj, okulkoloro, oketoj
- letero: subskribo, papero, sigelo, ktp.

La Estraro aŭskultas kaj respondas.

Reinhard Fössmeier prelegas pri komputila ĉifrado.

La kongresejo: Internacia Kongresa Centro, kun la Radioturo

La plej amuza ero de la Internacia Vespero

panorama

Elena Puňova, daŭra stelo de UK-oj

Venu ankaŭ venontan jaron!

Rezulto de Belartaj Konkursoj de UEA 1999

POEZIO: **Unua premio:** Antonio Valén (Hispanio) pro *Amafer' iama*. **Dua premio:** Stefan MacGill (Hungario) pro *Ercoj*. **Tria premio:** Gonçalo Neves (Portugallio) pro *Amoroj*. **Honoraj mencioj:** Gonçalo Neves pro *Gagat' kaj Aglo*. Partoprenis 52 verkoj de 25 aŭtoroj el 17 landoj.

PROZO: **Unua premio:** Sten Johansson (Svedio) pro *Nepoj en Torento*. **Dua premio:** Sten Johansson pro *Kastelo de revoj*. **Tria premio:** Lena Karpunina (Germanio) pro *La ridinda letero*. **Honora mencio:** Jorge Camacho (Hispanio) pro *Ludwig*. Partoprenis 20 verkoj de 14 aŭtoroj el 12 landoj.

TEATRAĴOJ: **Unua premio:** Paul Gubbins (Britio) pro *Nun ni parolu kaj Kien la pruneloj kreskas*. **Dua premio:** ne aljuĝita. **Tria premio:** Paul Gubbins pro *La forlasito*. Partoprenis 5 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj.

ESEO: "Premio Luigi Minnaja": Gonçalo Neves pro *Niaj verkoj sen veproj*. **Dua premio:** ne aljuĝita. **Tria premio:** ne aljuĝita. Partoprenis 7 verkoj de 7 aŭtoroj el 7 landoj.

KANTO: **Premio "Ahn Song-san pri Kanto":** Valentina Maria Nan (Rumanio) pro *Ami*. **Dua premio:** Fiorello Fiorentin kaj Aldo Fiorentin (teksto resp. muziko, Italio) pro *Rifuĝintoj*; Anja Karkiainen kaj Vesa Pölkki (teksto resp. muziko, Finnlando) pro *Kiam la folioj flavas*. **Tria premio:** Aldo Fiorentin pro *Pensoj pri la paco*. Partoprenis 10 kantoj de 6 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 6 landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO 1998: *Mirindaj aventuroj de metilemanto Hlapić* de Ivana Brlić-Mažuranić, tradukita el la kroata de Maja Tišljar kaj eldonita de Kroata Esperanto-Ligo. Partoprenis 3 libroj de 3 eldonoj el 2 landoj.

VIDBENDO: **Unua premio:** *Esperanto en Mecklenburg kaj Vorpommern 1905-1944* de Ralf Kuse (Germanio). **Dua premio:** *Esperanto: Komunikado kaj kulturo de Brazilia Esperanto-Ligo* (reĝisorita de Ciro Gomes de Freitas). **Tria premio:** *Malproksima eĥo de la Silka vojo* de Firdaus Šukurov (Taĝikio). Partoprenis 5 verkoj de 5 aŭtoroj aŭ grupoj el 7 landoj.

Artaj aranĝoj

Muziko

Sub la signo de romantiko

Pure polan posttagmezan programon povis ĝui granda parto el la kongresanaro, omaĝe al la 150-a mortdatreveno de Frédéric Chopin (1810-49).

Per impresaj, informriĉaj bildoj de sia filmo *Chopin revenas al Majorko* Roman Dobrzyński kondukis la spektantojn al Chopin-memorejoj de la insulo kaj solena inaŭguro de busto skulptita en Pollando. Poste li kompetente, sprite rakontis specife pri la pola fono de Chopin, kun ampleksa superrigardo kaj interesaj detaloj.

Transprenis la podion Urszula Tupajka: deklamante el *Sinjoro Tadeo*, ŝi nuanceplene ekvivigis la judan cimbalmuzikiston Jankel.

Kronis la aranĝon Chopin-muziko mem: Mariusz Adamczak, pola pianisto 20-jara, komencis per *Balado op. 23*, sekvata de *Skerco op. 39* kaj *Polonezo op. 53*, kiujn li en la virtuozaĵ partoj kun juneca vervo atakis, en la intimaj sublimaj kantigis, interligante ambaŭ per delikataj transiroj. En tiu ĉi parto precipe impresis fiere pompa interpretado de la *Polonezo*. Post paŭzo, en *Sonato op. 35* de Chopin aparte tuŝis la "Funebra marŝo", la tria movimento, la animojn de la fervore aplaudanta publiko. Pasia interpretado de la fama *Revolucia etudo* de Chopin digne finis altnivelan kulturalan posttagmezon.

Stila aŭ enhava romantikeco kunligis la du partojn de la samvespera koncerto.

Post leĝera saluto ("Kongresa kanto"), Elena Puĥova (piano) kaj Galina Staneŝnikova (kanto) prezentis trezorojn de la rusa romantiko. Denove montriĝis la stile fidinda, optimuma muzikado de la konata kaj aprezata rusa profesorina duopo. Apartan ŝaton

trovis poste la kanzonoj de Puĥova, kiu tiuparte kantis mem, foje subtene de ŝia partnerino. Kontribuis al tio la tekstoj de Mikaelo Bronŝtejn, distraĵ kaj pripensindaj. Se ekzistas Esperanta muziko, tiuj ĉi kunlaboraĵoj apartenas al ĝi.

Aldo Fiorentin, same konata pro pianokonzertoj dumkongresaj, omaĝis al la kongreslandaj komponistoj per pecoj saĝe elektitaj el la tuta germana



La sveda rokbanda Persone (Anders Grop, Bertil Wenner) koncertis ekster-kongrese, en minejece subgrunda lokalo de kafejo Flöz. Pli kaj pli senkateniĝanta publiko, averaĝe aĝlumo de 30 jaroj, ĝuis kantojn konatajn kaj novajn, i.a. la *Homoj kiel mi, Jam efikas la venen', Jen la bor', Kaj tiel*

romantiko. Unue li ludis, analizeme, la antaŭlastan sonaton de Beethoven kun ties jam romantikaj trajtoj. Sekvis *Seriozaj variaĵoj* de Mendelssohn, kun virtuoza interpretado de la ŝanĝiĝantaj rapidecoj, ludmanieroj, karakteroj kaj emocioj en la movimentaro, kio same okazis al la postaj 8 *Fantazi-pecoj op. 12* de Schumann. En la finaj du *Rapsodioj op. 79* de Brahms la pianisto tre nature peris la daŭran interŝanĝon de la afektoj pasia, dolĉa, impeta, dolora ktp. Atentema, disciplina, grandnombra aŭskultantaro aplaudis varme la multflankan pianiston, kiu ne supraĵe pompas, sed konvinkas per inteligenteco, vervo kaj majstra regado de la instrumento.

Franz-Georg Rössler - Germanio

Amika etoso, fervora publiko

La koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa Ĵam en si mem estis sufiĉa kialo partopreni la kongreson. La duopo allogis entuziasman publikon.

La kazahia paro, kiu de kelkaj jaroj loĝas en Stokholmo, prezentis bukedon el kantoj novaj kaj malnovaj. La kanto aperinta ĉe la tridekjariĝo de Ĵomart nun tekstas *Jam estas kvardek*, kaj ĉiam pli aktuale sonas "Ni atingis multajn gravajn aĵojn, ĉu memoras ni por kiu celo?" Sed eble plej imponis du el la novaj kantoj, la pensiga balado *Ĉio venas de l' nenio* kaj la kortuŝa *Valso por amikoj*.

Ambaŭ kantoj troviĝas sur la nova KD *Valso por amikoj* [vidu p. 159], kun pli varia akompano. Tamen ili funkcias almenaŭ same bone, se ne pli bone, kun la tradiciaj muzikiloj de Ĵomart kaj Nataŝa, akustika gitaro kaj bekfluto. La kantoj

de la duopo estas enorme riĉaj je etoso kaj enhavo, kaj ambaŭ tiujn ecojn inde substrekis la ŝparema akompano.

Ĉirkaŭ la duopo kolektiĝis intima rondeto de fervoruloj, kiuj konis la malnovajn kantojn parkere. Ne tro ĝenis ke la koncertejo estis malfermita spaco, estis eĉ agrable ke tiel la prezentado kaptis la atenton de multaj preterpasantoj, kiuj stariĝis rande de la amaso. Tamen la amika etoso estus eĉ pli intensa en iom pli intima ejo.

Post du ekstraj kantoj, la publiko sturme atakis la duopon por forŝiri el la manoj de Nataŝa la unuajn ekzemplerojn de la ĵus aperinta KD kaj peti aŭtografojn. Same mi.

Kalle Kniivilä - Svedio

Veroj pri la eterna infano

Nur infanoj scias kion ili serĉas [...] Oni bone vidas nur per la koro."

Jen la mesaĝo kiun Saint-Exupéry ofte ripetas en *La eta princo*. La aŭtoro eĉ sketas sur la rando de tro-simpla sentimentaleco, sed li evitas tiun danĝeron per ŝutado de pikaj spritaĵoj pri niaj vanaj priokupiĝoj. Tiu ŝajne naiva knabeto estas kaj raspe observokapla kaj samtempe vere aminda. Ni intuicias: la daŭra ĉarmo de *La eta princo* venas de

ĝia vero: la eterna infano en ni ja vidas pli klare ol la plenkreskulo kun mil zorgoj pri duarangaj aferoj.

La giganta salono en Berlino ne estis la plej bona situo por prezenti

tiun intiman fabelon sen spektaklaj ecoj. Sed la Zagreba paro Ivan Špoljarec kaj Livija Kroflin (surbilde) per lerta aktorado kaj klara prononco sukcesis atingi nin kaj samtempe —



Komplezo de Ivan Špoljarec

paradokse — koncentri nin ne pri ili sed pri la kara pupo, la eterna infano, kiun ili manipulis inter si. Ni ĝuis kaj gratulas.

Trevor Steele - Litovio

Zigzaguloj interpordas

Aktoroj invititaj unuafoje partopreni en teatraĵo kolektiĝis en la antaŭjarmila ĉambro 99. Nur post... (*historia projekciaĵo #1, eksplodigo de la unuaj atombomboj*)... aperas reĝisoro por organizi (zigzaguloj interpordas) la unuan provludon, en kiu surprize (stranduloj plonĝas en basenon) la tralegenda teksto forte similas al la dekomenca dialogado, nur sen emocio. Ne mankas (fruntofrota epidemio) aktorisma temperamento kaj diskuto ĉu interŝanĝi (*historia projekciaĵo #2, unuaj homoj sur la luno*) rolojn. Riske estas krei humuron el ripetado sen tedi, sed sukcesas la teksto, konstruante variaĵojn (ŝmaca manĝado de akvomelonoj) kaj spiralajn pluirojn, inkluzive de...

"Mi opinias ke ĉi tiu recenzo estas

stulta! Ĝi enhavas idiotajn frazojn."

"Vi pravas. Mi scias nur ke la recenzanto estas ekster-ordinare ne-juna kun stranga nomo."

"Eble li venos poste. Ĉiuokaze, ni povas pluiiri sen li."

Foje rolulo trudas sian vivrakonton, kiu permesas (*historia ktp #3, falo de la Berlina muro*) eskapi el la ripetiga labirinto. Junulo hontigas sian familion iĝinte (batistoj martelbruas) pretersave intelektula. Entute, spektantara reago favora, fojfoja ridado. Verkinto fine aperas, minacas pafi la rolulojn... ankaŭ tiun kun plantoj en la genuoj. Kion kompreni? Mondskuaj eventoj okazas, sed tuŝas unuopulojn nur surface. Ĉiu rolas, parkeris siajn tekstojn, gestojn, ŝablonojn kaj uzas ilin por scenumadi tra la vivo. Sed vera ŝanĝo? Nu, ĉu tiu teatraĵo ŝanĝis vin?

Stefan MacGill - Hungario

☞ (Daŭrigo de p. 143)

probable eĉ pli altas. La usonaj filmoj kredeble ĉiam pli dominos, pro la atendebla teknika progreso de televido kaj atingos ankaŭ la analfabetajn amasojn en evolulandoj. Tiuj filmoj reklamas usonajn viv- kaj konsum-modelojn. Se evolulandanoj alstrebos ĉi tiujn, nepre sekvos ekologia katastrofo, ĉar ĉe usona konsumnivele la terglobo kapablu vivteni ne pli ol trionon de siaj ses miliardoj. Aliflanke, la evidenta malsukceso atingi tiun celon kaŭzos profundan frustron, kiu siavice povos naski psikajn kaj politikajn reagojn malfacile prognozeblajn.

Internacia komunumo?

La dominado de la evoluintaj landoj lastatempe etendiĝis ankaŭ al la politika, eĉ milita sfero. En la lasta jugoslavia milito 19 NATO-membroŝtatoj elegante deklaris sin “internacia komunumo” kaj ekmilitis kontraŭ Jugoslavio. El nia vidpunkto la esenco estas ne ĉu la Miloŝeviĉ-reĝimo kulpis aŭ ne, sed tio ke tiu milito marĝenigis la internacian juron kaj la universalan organizon UN. Oni diras ke de nun tiu milito tutmonde bremsos ŝtatan perforton kontraŭ propraj civitanoj. Sed tio verŝajne koncernas nur ŝtatajn perfortojn juĝotajn punindajn en Vaŝingtono kaj Bruselo.

Kiu (mal)profitas?

Kiuj profitas, kiuj malprofitas el la nuna tutmondiĝado?

Evidente, la profitantojn ni devas serĉi unuavice en la evoluintaj landoj. Temas pri la posedantoj kaj direktantoj de la ekonomiaj societoj, kiuj realigas la kapital-eksporton kaj la translokadon de la produktado al aliaj landoj. Ili trioble gajnas. Unue: en la nova loko laborforto signife malpli kostas. Due: la aŭtoritatoj tie ĝenerale dorlotas investantojn per impost-faciligoj. Trie: konservante siajn pli fruajn merkatojn, ili ekhavas novajn. Fakte, dislokante sian produktadon ili sendependiĝas de la registaroj kaj, forglitante el la socia kontrolado, ili fariĝas preskaŭ nevundeblaj. Ĉio tio rezultigas abruptan enspezo-kreskon por la posedantoj kaj por iliaj privilegiitaj direktantoj.

Profitantoj tamen troviĝas ankaŭ en la landoj akceptantaj tiun eksporton: unuavice tiuj lokaj elitanoj kiuj kunorganizas la produktadon. Profitas ankaŭ tiuj laboristoj de la kapital-akceptantaj landoj kiujn la nove kreitaj produktoj dungas: ĉar ili entute ekhavas laboron kaj eble eĉ ricevas iom pli altan salajron ol kutime. Profitas komence ankaŭ la kapital-akceptanta ŝtato: malgraŭ la impost-faciligoj iom kreskas ĝiaj impost-enspezoj, kaj pro la malpliigo de la senlaboreco moderiĝas la socialaj elspezoj. Problemoj ekestas kiam tiuj entreprenoj komencas elporti sian profiton el la lando. Tion malfacile eltenas la ankaŭ cetere ne ekvilibra ekstera mona bilanco de tiuj landoj: ĝenerale ili provas fliki la truon per kombino de pruntoj kaj allogado de pliaj investantoj.

Malprofitas en la evoluintaj landoj antaŭ ĉio tiuj laboristoj kiuj pro la produktad-translokado perdas la laboron; sed malprofitas ankaŭ ties registaroj. Pro la forportita produktado ŝrumpas impost-enspezoj, dum kreskas senlaboreco, generanta ŝtatajn elspezojn. Eliri el tiu kaptilo eblas nur per ŝparado je socialaj elspezoj, malaltigo de la nivelo de la socia provizado kaj de la vivnivelo ĝenerale.

Malprofitantoj troviĝas ankaŭ en la landoj akceptantaj la kapital-importon. Pro la abrupta malfermo de la naciaj ekonomioj tie povas detruigi tutaj industriaj branĉoj tradiciaj, likvidante pli da laborlokoj ol kiom la kapital-importo produktas. La abrupta apero de novaj produkto-kulturoj — krom la perspektive evoluiga efiko — povas kaŭzi psikan ŝokon kun ties negativaj sociaj konsekvencoj. Multa detruo sekvas ankaŭ el tiu formo de kultura tutmondiĝo kiun enkorpiĝas ĉefe la enpenetro de aro da senpretendaj “sap-operoj” kaj filmoj radiantaj agresivecon. Tiu stultiga bildofluo efike malriĉigas la lingvan kulturon, marĝenigas la skriban kulturon, la bazon de tio kio igas la homon tiel granda kia ĝi estas.

Perdoj kaj gajnoj

Per la nuna formo de tutmondiĝo dum pli longa periodo perdos la plimulto de la homoj, ĉar lastatempe ĉie en la mondo oni daŭre revizias la sociajn kontraktojn, favore al la kapitalo. Salajroj kaj sociala prizorgo fine tendencos monde unueciĝi meze inter la nunaj svisa kaj, ni diru, bangladeŝa niveloj. Tiel svisoj perdos; bangladeŝanoj nur ŝajne gajnos. Perspektive ankaŭ ili perdos, ĉar ili certe neniam atingos la nunan nivelon, kiun iam principe ili ja povus atingi.

Do, la respondo al “Tutmondiĝo — ĉu ŝanco por paco?” ne povas esti unusenca. La ĵus vicigitaj negativaĵoj multajn influas respondi nee.

Tamen rifuzi ĝin tutan ne eblas, kaj eĉ se eblus, estus malprudente. Se la homa intelekto sukcesis krei ilaron transportan kaj telekomunan per kiu eblas intensa kunlaborado de la sesmiliard-opa homaro, estus stulte ne uzi ĝin. Ni povas respondi jese al tutmondiĝo, sed per emfaza neo al tutmonda dominado fare de dudeko da landoj, kaj per aparte forta neo al la dominado fare de unu el ili. Usonanoj havas ja multegajn kaŭzojn por fieri, sed ili komprenu ke la ceteran homaron ne feliĉigos se ĉie sur la terglobo elkreskos kopioj de Usono.

La vera tutmondiĝo

Subteni la veran tutmondiĝon ne nur ne ekskludas, sed eĉ neprigas kontraŭstaron al tiaj fenomenoj. Tio povas konflikti kun la intereso, ofte ŝtate apogataj, de ekonomiaj grupoj, sed por la celo — kreo de egaleca, demokratia tutmondiĝo, surbaze de reciproka interefiko de la partoprenantoj — indas alfronti tiujn konfliktojn. Vera tutmondiĝo donos ŝancon por paco, ĉar en ĝi ĉiuj rajte sentos sin profitantoj. Male, tutmonda dominado fare de malvasta ekonomia elito vekos en la ceteraj kvin miliardoj senton de venkateco, kaj tio elvokas ne tipe pacajn refleksojn.

Por eviti malpacon necesas ke la evoluintaj landoj montru profundan sinmoderigon en la plua fluo de la tutmondiĝa procezo. Necesas ke ili memoru tion ke baza briko de ĉiu kulturo estas sinlimigo.

Ni esperantistoj estas fruaj apostoloj de egaleca tutmondiĝo, nutranta sin el la reciproka interefikado de kulturoj. Ni estas optimismaj ankaŭ nun, kiam la aŭguroj por atingi tian tutmondiĝon ne estas aparte esperigaj. Solvas “homa cerb” problemon, / kiu ankoraŭ ne sentigis premon” — jubilis William Auld pri la homa kapablo en sia epokfara *La infana raso* antaŭ 43 jaroj. Nun la problemoj jam sentigas premon, kaj la “homa cerb” certe solvos la problemon — sed nur se ni ĉiuj partoprenos en la solvado.★

Post semajno memorplena



Konvene al kongreso kiu debatis pri tutmondiĝo, la ceremonion enkondukis danco de la koreino SONG Ĝong-Ok, akompanata de la tambureca instrumento *ĝang-gu*.

Prezidanto Enderby prezentis la podianojn: el la inaŭgura tablanaro (vidu p. 144) forestis Bormann, Kniivilä, Stocker kaj Tannert, sed aldoniĝis la dume elektita estrarano Tacuo Huĝimoto, LKK-anino Ina Tautorat kaj Hans Erasmus.

La ambasadoro de Israelo, Avi Primor, invitis al la lando de nia venonta UK. Post unua frazo en E-o, li salutis en la “antaŭ nelonge renovigita antikva lingvo” hebrea kaj malkaŝis sian revon: iam en ĉiuj lernejoj oni lernos el sama libro, en sama lingvo libervole akceptita — eble Esperanto.

Transdoninte saluton de la Oficejo kontraŭ Etna Diskriminacio (Germanio), ĝenerala sekretario Michela Lipari heroe provis resumi la diversion de la kongresa septago per ciferoj kaj trafvortoj: aliĝis 2712 personoj el 66 landoj; la Komitato kunsidis 14 horojn (raporto aperos oktobre); vizitis la kongreson ĉ. 20 ĵurnalistoj; pri Esperanto sciigis 30 radio-intervjuoj kaj cent da gazetartikoloj en Germanio ktp.

La ciferon 50 aldonis Osmo Buller, anoncanta la rezultojn de la 50-a fojo de Belartaj Konkursoj (vd. p. 152).



Avi Primor,
ambasadoro de
Israelo

Erasmus raportis pri la Nitobe-simpozio, Petro Chrdle pri la Strategia Forumo (vidu p. 146), Vilmos Benczik pri la kongrestemo. Renato Corsetti prezentis la kongresan rezolucion (vidu p. 141).

Buller anoncis ke Premio Deguchi (ĉ. 2000 eŭroj dank’ al la japana religia movado Oomoto), ĉiujare aljuĝata pro “per-Esperanta agado, kiu antaŭenigas (...) estimon al aliaj popoloj”, iras al la 79-jara germano Heinz Schindler, kiu en la pasintaj 4 jardekoj vizitis 127 landojn, ĉie helpante la E-movadon. Multaj povis aliĝi al UK, membriĝi en UEA aŭ eĉ aliĝi al Societo Zamenhof per la helpo de Schindler.

Huĝimoto komunikis ke Subvencio Cigno (ĉ. 4000 eŭroj), aljuĝata por agadoj triamondaj aŭ orient-eŭropaj, ricevas Fondaĵo Afriko, por kovri la unuajn kostojn de starigo de labor-



Eran Vodevoz
akceptas la flagon
por la venonta UK.



Heinz Schindler ricevas
Premion Deguchi el la
manoj de Kep Enderby.

Enderby diris koran dankon al ĉiuj LKK-membroj, kiujn Ina Tautorat vokis laŭnome sur la scenejon. Estis dankataj ankaŭ “multaj aliaj, kiuj lastmomente ensaltis”, kaj la redaktoroj de la sesnumera kuriero *Pordego al kongreso* (el kiu fontas pluraj eroj de nia “Kalejdoskop”, p. 156).

Fine Enderby memorigis pri tiuj kiujn la kongreskostoj tenis hejme, sed ja alvokis al kiel eble plej amasa veno al la Tel-Aviva UK, kiu “promesas esti unu el la plej ekscitaj”.

Por tio necesis ke Ina Tautorat transdonu “malpezan flagon, sed pezan taskon” al Eran Vodevoz, israela LKK-ano. Revidiĝonte venontjare en Tel-Avivo, la kongresanoj ekforlasis memoplanan semajnon kun la harmonioj de “La Espero” ankoraŭ postsonantaj en la salonego.

István Ertl

komitato en Togolando, kunordigonta la afrikan E-agadon.

Siavice GBEGLO Koffi anoncis ke Trofeon Fyne — kiun en ĉiu dua jaro ricevas asocio en kies lando proporcie plej multe kreskis la individua UEA-membraro — meritis Argentina E-Ligo per 38%-a kresko, de 49 al 68 UEA-membroj.

Lipari sciigis pri anonima donaco de 5000 gld., por egala distribuo inter ĉiuj landaj asocioj en la iama Jugoslavio.

Post sia kongreseta semajno ĉe la Diabla Lago en Potsdam, 37 infanoj el 14 landoj salutkantis, gvide de Sabine Trenner.

La eta kongreso salutas la grandan kongreson.

Instruado: De gestoj ĝis ekzameno

Meze 195 homoj kolektiĝis ĉiutage por praktiki la lingvon en du grupoj, en pluraj sesioj. Diversaj aktivigaj ludoj ebligis interkonatiĝon kaj lernadon per grupa laboro. La sesiojn kunligis la temo "komunikado gesta kaj parola". Kantoj, teatraĵoj, duopa konversacio, amasa dialogo, desegnado ktp estis la vojoj uzitaj por sukcesa paroligo.

(A. Orellana Rojas)

Al Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA aliĝis po 7 personoj por la elementa kaj meza niveloj; sukcesis 4 resp. 6.

Etnismo: Humanisma deklaro

Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (<http://Beam.to/IKEL>) aprobis Deklaracion pri Etnista Humanismo (vidu feb., p. 37), kiu lokas la etnisman problemaron en tutmondan kuntekston ekonomie kaj ekologie. Post la UK (18 aŭg.) IKEL lanĉis deklaron pri la eksplodema situacio en Dagestano, i. a. esprimante "sian apogon al la agantoj por Dagestano laika kaj tolerema".

Historio: Memore al Rytjkov

Memorkunvenon pri la rusa aktoro Nikolaj Rytjkov (1913-73), fuĝinta en 1965 okcidenten, organizis Maria Abolskaja el Sankt-Peterburgo, kompilinto de la libreto *Sub la signo...* pri Rytjkov [vidu p. 159]. I.a. aŭdiĝis partoj de longa intervjuo, kiun Rytjkov donis en 1968, laŭ peto de Ulrich Lins, pri sia 18-jara suferado en koncentrejoj Stalinaj. Speciale por la kunveno alflugis el Belfasto la vidvino Maria Rytjkov Ellis. (U. Lins)

Aŭkcio: Ne nur por riĉeguloj

Energia ofertado de la sperta aŭkciestro Humphrey Tonkin (maldekstre surfote) instigis vendojn je entute 2485 markoj, sumo kiun ricevas la Volontula Fondaĵo de UEA. Plej altpreze vendiĝis la binditaj jarkolektoj 1892-95 de la revuo *La Esperantisto* (320 markoj), *Bibliografio de Internacia Lingvo* (1929) de P. Stojan (150 DEM), la kongresa numero 1 de la UK en Tel-Avivo (120 DEM) kaj la antologio *Eterna bukedo* (1931) de Kalocsay (105 DEM). Alte (65 DEM) taksigis ankaŭ kravato donacita de Nikolaj Rytjkov al Ralph Harry. Ke aŭkcioj taŭgas ne nur por riĉeguloj, pruvis ke haveblis pluraj malnovaj interesaĵoj por nuraj 10-15 markoj.

Fake, loke, jarkunvene

- Sub la nomo Aŭtoklubo Esperantista reviviĝis faka asocio de aŭtomobilistoj, kun reprezentantoj el 11 landoj.
- 76 fervojistoj el 17 landoj aŭdis prelegon en la mezo de Berlino pri EXPO 2000 en Hanovro kaj ekskursis al granda fervojo-konstruejo.
- La membraro de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo kreskis en ĝia 15-a vivjaro. Makleraj de reklamoj helpas la financon stabilecon. Novuloj aliĝis al la Terminara Sekcio.
- Ĉe Internacia Naturkuracista Asocio ĉ. 140 kongresanoj aŭdis prelegon pri aŭtismo kaj novaĵojn pri la TTT-paĝoj www.esp-ina.com, pri subteno donata de germana firmo kaj korea prelegvojaĝo de Harald Schicke.
- Mondcivitanoj (ĉ. 60-70 kunvenintoj) lanĉis tekston pri ĉiulanda starigo de pacministerioj ekde la jaro 2000.
- Ligo de Samseksamaj Gee-istoj ne ŝanĝos sian nomon al Gej-Lesba E-Asocio (kiel ja proponite). Prezidanton John Wells sekvas Arnold Victor. Ĉeestis la fondinta membro Peter Danning, kiun oni elektis honora prezidanto.

Bicikle el Ĉeĥio

73-jara instruisto pri gimnastiko kaj geografio, Oldřich Schwetter (Ĉeĥio) biciklis 1146 kilometrojn de sia hejmloko ĝis Berlino, vizitante survoje geamikojn.

Afriko: Virino en Berlino

Carine Attiogbe-Agbemadon (surfote), 18-jara filino de la togolanda aktivulo Mensah Agbemadon, estis la sola afrikanino en la UK. Helpe de lokaj e-istoj, ŝi restadis 25 tagojn en Germanio kaj Hungario (en la IJK).

(H. Bakker)

Urba akcepto: UK pozitivis

Nome de la ĉefurbestro Eberhard Diepgen, bonvenigis la invitojn urba senatano Peter Radunski (dekstre). En riĉ-enhava parolado li nomis "rimarkinda" ke la UK koncentriĝas al la "eblaj sekvoj pozitivaj de tutmondiĝo, dum ĝuste en Germanio la nocio 'tutmondiĝo' ofte havas negativan nuancon."



**LA ĈI-JARA AGO-TAGO
OKAZOS LA 2-AN DE
OKTOBRO, SABATE.**

- E-lingva Verkista Asocio alvokos legantojn de kelkaj gazetoj elekti siajn 25 plej ŝatajn aŭtorojn/verkojn Esperantajn kaj planas starigi vidbendan arkivon (ekz. kun intervjuoj) pri E-aŭtoroj.
- En Forumo de Fakaj Asocioj (ĉ. 50 homoj) László Szilvási informis pri projekto de Budapeŝta E-Domo redisponegi fakan literaturon per enkomputiligo de ne plu haveblaj verkoj, kaj André Weber proponis ke "E-produktoj" sisteme menciu la adreson www.esperanto.org/.

Informado: Preparita tereno

Gazetara konferenco de Germana E-Asocio en la Berlina urbo-domo (29 jul.) kunvenigis ĉ. 25 ĵurnalistojn kun Frank Stocker, Marko Naoki Lins, LKK-ano Fritz Wollenberg kaj Kokou Sagbadjelou, prezidantoj resp. de GEA, Germana E-Junularo, E-Ligo Berlino kaj Unuiĝo Togolanda por E-o. Dudeko da ĵurnalistoj vizitis la kongreson mem. Dank' al plurmonata informlaboro de GEA-aktivuloj kaj Berlinaj e-istoj, jam antaŭ la UK aperis cento da artikoloj, en preskaŭ ĉiuj Berlinaj gazetoj kaj multaj tutlandaj periodaĵoj, plejparte pozitivaj pri E-o. Artikoleto en la plej

legata semajna magazino de Germanio, *Der Spiegel*, estis verŝajne la unua mencio en ĝi pri Esperanto post longaj jaroj. GEA ankaŭ dissendis informon al ĉiuj gazetoj en la regionoj el kiuj venis e-istoj al la UK. Rezulte, post la UK multaj artikoloj aperis loke, de *Stuttgarter Zeitung* ĝis *Lausitzer Rundschau* kaj *Fränkischer Tag*.

• Komuna deklaro de finnaj kaj germanaj kongresanoj pri la “germana-finna lingvobatalo” (prezid-lando de EU de post junio, Finnlando ne allasas la germanan kiel laborlingvon en neoficialaj interministraj renkontiĝoj) vekis intereson ĉe la finna gazeto *Keskisuomalainen* (76 mil ekz.), kiu komentis jene: “la registaroj... forges[as] la klopodojn solvi la [lingvan] problemon en spirito de la baza statuto de la Unio.” (A. Pettyn)

Aŭtoraj duonhoroj

En angulo de la Libroservo renkontis sian publikon la Esperantaj aŭtoroj Roman Dobrzyński (surfote), Ronald Gates, Georgo Handzlik, Malcolm Jones, Erich-Dieter Krause, Anna Löwentstein, Geraldo Mattos kaj Manuel de Seabra.

Statistiko: Pinta deko

Laŭ kalkulo de Halina Gorecka, la plej multaj aliĝis el la kongreslando (498); sekvas laŭvice Pollando (300), Francio (294), Japanio (221), Nederlando (103), Svedio (101), Italio (96), Belgio (85), Ruslando kaj Britio (po 72).

Ameriko: Regulaj kongresoj?

122 personoj informiĝis pri la agado de Komisiono por Ameriko sub la gvido de Atilio Orellana Rojas (dua de maldekstre). Estis diskutita regula okazigo de tutamerikaj kongresoj (vidu marto, p. 42) kaj fortigo de kontaktoj kun najbarlandaj asocioj. Bill Maxey (maldekstre) el Usono, Magali Lajus el Francio (meze) kaj Rainer Kurz (dekstre) el Germanio, vojaĝintaj en diversaj landoj kaj regionoj, de Kolombio ĝis Patagonio, ravis la publikon per siaj raportoj. Ĉeestantoj malavare donacis monon por sendi vortarojn al Kubo.

• En 10-minuta intervjuo de la tutmonda TV-kanalo BBC World (9 aŭg., malfruvespere), Kep Enderby verve parolis pri E-o, la lingvo kaj ĝia literaturo ktp. Por spici la konversacion, la programestro diris kelkajn simplajn frazojn en Esperanto: *Saluton, kiel vi fartas, mia nomo estas Davido*.

Ekumena meso

En la preĝejo Sankta Maria pastroj diversnaciaj gvidis diservon. “Malgraŭ elreviĝoj dankemon pri ĉiuj ebloj” predikis Adolf Burkhardt.

Eŭropa agado: Trojko

Eŭropa E-Unio — kunordiga organizo de landaj E-asocioj (LA) en Eŭropa Unio — havas novan estraron (“trojkon”): Umberto Broccatelli (Italio) prezidas, Katinjo Fetes-Tosegi (Aŭstrio) sekretarias kaj kasisisto estas Hans ten Hagen (Nederlando). En Berlino reprezentigis 12 LA: Grekio ne povis sendi iun, Britio kaj Danio mankis. En publika kunveno oni substrekiis: necesas aktiva apogo, labora kaj financa, de ĉiuj LA; dezirindas ke eŭropaj LA el ekster EU aliĝu kiel “observantoj”. (U. Broccatelli, Nova Sento)

Arto: Du ekspozicioj

Du e-istinoj el Germanio montris siajn artaĵojn: fotojn eksponis Katarina Eckstädt, kaj portret-pentraĵojn alportis Helga Plötner (surfote), kiu cetere pretigas altkvalitajn portretojn eĉ laŭ senditaj fotoj (Friedrich-Ebert-Str.9, DE-06773 Gräfenhainichen, Germanio).

TTT-PAĜOJ PRI LA UK

Laŭ la paĝo www.esperanto.de/ estas troveblaj:

• Beletraĵoj pri Berlino (Isherwood kaj Varankin): [/uk99/beletro.html](http://uk99/beletro.html)

• Dumkongresaj informoj (lasta ŝanĝo la 7-an de aŭg.), kun paĝo pri la Infana Kongreseto: [/org/lv.berlin/UK_aktuala/](http://org/lv.berlin/UK_aktuala/)

• Gazetaraj komunikoj antaŭkongresaj, ĝermane: [/presse/](http://presse/)

Kaj plue:

Fakaj asocioj kunvenintaj (D. Meier): www1.inetservice.de/esperanto/uk-fa.htm/
Sonraportoj de Pola Radio (A. Oberndorfer): <http://start.at/retradio/>

Kantoj de Persone (vidu p. 152), prezentitaj en Berlino: http://purl.oclc.org/net/personeo?d=persone/novaj_kantoj.htm/

Bonvenas pluaj indikoj, ekz. pri kongresaj travivaĵoj en personaj hejmpaĝoj.

NOVA ESTRARO DE TEJO 1999-2001

Prezidanto: Sjoerd Bosga (Nederlando/Svedio)

Ĝenerala sekretario: Aleksandr Blinov (Ruslando)

Kasisto: Ilja De Coster (Belgio)

Estraranoj: Grigorij Arosjev (Ruslando), Holger Boos (Germanio), Joaquín Rosillo Vega Acosta (Meksiko)

Krom elekti la Estraron, la Komitato de TEJO akceptis en la 55-a Internacia Junulara Kongreso (Veszprém, Hungario) ankaŭ la aliĝpeton de Honkonga Junulara E-Asocio. Sekve TEJO nun havas 41 landajn kaj 2 fakajn sekciojn. Aliĝpeton prezentis ankaŭ E-ista Junulara Organizo de Respubliko Serba, sed la Komitato ne trovis la aferon matura por decido.

NOVA ONDO DE MISUZO DE LA JARLIBRO

Lastatempe multaj delegitoj de UEA ricevis anglalingvan leteron el Nigério kun propono pri "komerca kunlaboro": transigo de enorma monsumo al la banka konto de la delegito kontraŭ granda makleraĵo.

La intencoj malantaŭ tiu propono estas evidente krimaj. La Centra Oficejo klopodas nun malkovri kiel la sendinto(j) havigis la Jarlibron. Tiucele ĉiuj kiuj ricevis tian leteron estas petataj sendi ĝin, kune kun la koverto, al la CO de UEA. Ankaŭ pri aliaj leteroj kun komercaj proponoj aŭ peto pri monhelpo konsilindas unue konsulti la Centran Oficejon, eĉ kiam la petoj je unua vido ŝajnas sinceraj kaj subtenindaj.

La Delegita Reto estas servo nur por la membroj de UEA. Delegitoj rajtas ignori ĉiujn leterojn kiuj ne estas skribitaj en Esperanto aŭ/kaj kiuj ne estas provizitaj per la membromarko de UEA.

(Osma Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA)

THORSEN-SUBVENCIOJ POR ESPERANTO-BIBLIOTEKOJ

Ĉi-jare UEA disdonos por la tria fojo subvenciojn de Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. En la du antaŭaj jaroj 19 E-bibliotekoj povis pliriĉigi siajn kolektojn je la suma valoro de NLG 7700. Ĉi-jare la Biblioteka Apogo disponigas ĉ. NLG 4000 (€ 1800).

Povas peti subvencion Esperantaj bibliotekoj ne subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. La subvencipetoj devas esti faritaj en formo de listo de dezirataj libroj. Ne-libraj varoj ne estas subvencieblaj. Se la peto estos akceptita, la koncerna biblioteko ricevos librojn ĝis la valoro de la subvencio.

La subvencipetoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15-a de oktobro 1999.

ATENTU:

VENONTA MALFERMA TAGO, SABATON LA 27-AN DE NOVEMBRO 1999 (10H00 - 17H00)

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vidu en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

DEZIRAS KORESPONDI tutmonde pri ĉiuj temoj, interŝanĝi pm., pk. kaj monerojn Wei Jianhua, 3 hao xin xiang, CN-063000 Tangshan, Ĉinio.

18-JARA RIFUĜINTO EL KONGO deziras korespondi kaj ricevi E-legaĵojn por iĝi "matura en Esperanta lingvosocio". ANZURUNI MSABAH Barnab, Nyarugusu tendaro, F2 cl 5 Pl 13, p/a Mubinge Justine P. O. Box 21, Kasulu, Kigoma, Tanzanio.

OKULVITRAJN LENSJOJN kolektas por Togolando Robert Kueny

(30 rue des Champs, FR-68690 Geishouse, Francio).

UNIVERSALA ISLAMA E-ASOCIO (Informa centro Esperanto, Chowk Lower Mall, 47150 Murree, Pakistano) senpage disponigas la verketojn S-ro Muhammad (B.A.), la vivhistorieto de la Islama profeto; Alif Laam Miim; Kuraana leciono; Tezoj pri Islamo kaj Lasta parolado de lasta profeto. Bv. sendi unu internacian respondkuponon por ĉiu verketo mendata.

EN LA TANZANIA RIFUĜEJO Lugupu, "Mag. Helga-Klubo" ins-

truas Esperanton en lerneja centro, celante krei solidarecon kaj amikecon por kune solvi ĉirkaŭajn problemojn. Por disvastigi la agadon en aliaj rifuĝejoj tanzaniaj, la klubo bonvenigas lerno- kaj lego-materialojn, konsilojn kaj monhelpon. Kontakto: Lwitela M. Guerchoom, P. O. Box 612, Kigoma, Tanzanio. [Vidu foton en nov. '98, p. 190.]

29-JARA FRAŬLO deziras korespondi tutmonde: Sorin Coste, Str. Transilvaniei Nr 25, AN 52, Ap. 26, RO-3700 Oradea, Rumanio.

POR KOMPILO DE MEMORLIBRO pri Hemmo Tietti (vidu p. 160), kun leteroj, artikoloj, fotoj de kaj pri li, kontakto GBEGLO Koffi (B. P. 13169, Lomé, Togolando).

XI'AN ESPERANTA KLUBO, ĵus fondita, serĉas kontaktojn: s-ano Qiushi, CN-710068, 221-Nr. 29, Huannanlu Xiduan, Xi'an, Ĉinio; ☎/✉ +86/29/841-24-63; ✉ taiyaanz@pub.xaonline.sn.cn.


ĈU IU SCIAS KIO OKAZIS al Viktorija Tiŝenko (Ruslando), kiu vivis antaŭ 4 jaroj en Pskov, post translokiĝo el Jekaterinburgo? Respondu al Françoise Noireau, Les Pommiers, 14 B Chemin de la Tour, FR-05100 Briançon, Francio; ☎+33/4/92-20-35-34.

30-JARA FRAŬLO, magistro pri persa literaturo, ŝatus korespondi pri ĉio. Reza Ghodarzi, P. O. Box 461, IR-69146 Borujerd, Irano.

KLUBON DE BRIĜ-LUDANTOJ volas fondi Fernando Paredes (Muralla no. 423 - Apto. 101, CU-10100 Habana Vieja, prov. Ciudad Habana, Kubo).

EN AGRIKULTURA GIMNAZIO de La Roche-sur-Yon (Francio) Christine Raiffaud (✉ christine.raiffaud@educagri.fr) inikos al Esperanto studentojn (de 18 ĝis 24 jaroj) de 15 ĝis 19 nov. Ŝi ŝatus starigi interŝanĝojn kun studentoj al kiuj E-o estas instruata.

Laste aperis



Australia Felix. *Noveloj.* Trevor Steele (1940). Vieno: IEM, 1999. 132p. ISBN 3 901752 15 3. 23cm. Noveloj el la jusa pasinteco kaj nun de Aŭstralio, aborigena kaj blankula. € 11,10.

Esperanto. Das neue Latein der Kirche. *Die internationale Sprache im Dienst der Verständigung unter evangelischen und katholischen Christen.* Dr. Ulrich Matthias (1966). Messkirch: Armin Gmein, 1999. 125p. ISBN 3 926633 39 5. 21cm. Bind. Germanlingva. Historio kaj nuntempo de la katolika E-movado. € 9,00.

Esperanto in Leipzig und Umgebung 1945-1991. *Heft 1: Chronologie der Zeitabschnitte; Heft 2: Veranstaltungen.* Kompilis Rolf Beau (1939). Althen: Landesverband Sachsen im DEB, 1999. 195+236p. 21cm. Germanlingva. Historio de la E-movado en la Lepsika regiono. € 16,50.

Esperanto in Mecklenburg und Vorpommern. *Eine Chronik 1905-1998; Fakten – Daten – Namen.* Ralf Kuse (1954). Kiel: Esperanto-CD, 1999. 328p. ISBN 3 924409 04 8. 21cm. Germanlingva. Historio de la E-movado en la plej nordorienta regiono de Germanio. € 15,00.

Esperantologio / Esperanto Studies. *Kajero 1.* Red. Christer Kiselman. Varna: Bambu, 1999. 80p. 29cm. Kvazaŭ daŭrigo de la revuo *Esperantologio* de P. Neergaard. Kontribuoj: M. Boulton, C. Støp-Bowitz, P. Neergaard, G. Mattos, D. Blanke, S. Fiedler, M. v. Oostendorp. € 22,00.

Federacia Konstitucio por la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo. *Eine Bundesverfassung für die Vereinigten Staaten Europas.* Dietrich M. Weidmann (1960). Zuriko: Mondo-Servo, 1998. 36p. ISBN 3 909140 13 0. 21cm. Dulingva (E-germana). € 5,00.

Internacia Kongresa Universitato 1999. *Berlino 31 julio - 7 aŭgusto 1999.* Red. Michela Lipari. [Rotterdam]: UEA [1999]. 81p. 30cm. Prelegoj de A. J. Bishop, E. Bojaĝieva, M. Boulton, H. Eichkorn, R. Fössmeier, H. Tonkin kaj M. R. Urueña. € 7,80. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Lingva arto. *Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton.* Red. Vilmos Beniczik. Rotterdam: UEA, 1999. 5+217p. ISBN 92 9017 064 6. 21cm. 23 aŭtoroj omaĝas esee al la 75-jaraj jubileantoj. (Vidu la dorskovrilon.) € 16,50. Triona rabato ekde tri ekz.

Marta. *Rakonto.* Eliza Orzeszko (1841-1910). El la pola trad. (1910) L. L. Zamenhof. Bielsko-Biala: KLEKS, 1999 (5-a eld.). 256p. ISBN 83 7194 020 3. 20cm. Bind. Romano inspirinta la virin-emancipajn movadojn, pri junulino luktanta por digna vivo en la jarcent-komenca Pollando. Klasika traduko. € 12,00. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Memevoluo kaj dancantaj figuroj. Maria Amanta Smilet. La aŭtoro, [1997]. 38p. 21cm.

Sonet' / Sonet. Grigorij Arosjev (1979). Ilus. Maša Telepneva. Moskvo: Impeto, 1998. 63p. ISBN 5 7161 0057 0. 20cm. Po duono Esperantlingvaj kaj rusaj poemoj, kiuj ludas lingve, ideo kaj bilde. € 3,00.

Sub la signo de Liro kaj Verda Stelo. *Memorlibro pri aktoro Nikolaj Rytikov.* Kompilis M. Abolskaja. Moskvo: Impeto, 1999. 46p. ISBN 5 7161 0060 0. 21cm. Memoroj de kaj pri rusa e-ista aktoro (1913-73). Kun fotoj. € 2,70.

KASEDO

Omaĝe al L. L. Zamenhof. *(Kantoj).* Aldo Fiorentin (1958). Paola Marzolla (soprano), Clorindo Manzato (baritono), Aldo Fiorentin (piano). Padova: AUA Records, 1999. 39 min. 9 kantoj: 4 laŭ poemoj de Zamenhof, 5 kun tekstoj de Fiorello Fiorentin. € 9,00.

KOMPAKTAJ DISKOJ

Ni tostuj la verdan fortunon. *Kabaredaj kaj bardaj kantoj.* Georgo Handzlik (1958). Bielsko-Biala: KLEKS, 1999. 19 kantoj. 51 min. Kantoj jen gajaj kaj satiraj, jen melankoliaj kaj amaraj pri la "vivo de la verda popolo". € 15,00. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Omaĝe al L. L. Zamenhof. *(Kantoj).* Vidu ĉe "Kasedo". € 15,00.

Valso por amikoj. Ĵomart kaj Nataŝa. Stokholm: Audio-Disk, 1999. 46 min. 12 melodias kanzonoj de stelula paro de eŭropaj E-renkontiĝoj. (Vidu p. 153.) € 18,00.

VIDBENDO

Esperanto bunte vivas. *83a Universala Kongreso de Esperanto, Montpellier, 1998.* Foris Productions. Rotterdam: UEA, 1999. 28 min. VHS/PAL. Profesia vidbendo pri UK. (Vidu la dorskovrilon.) € 24,60. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!



De aborigena Aŭstralio kaj sen-emancipa Pollando ĝis kazahaj kanzonoj el Svedio gamas la postkongresa kultur-rikolto.

32 poemoj de pol-origina danino pri ĉiutaga vivo. € 3,00.

Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM. *Homoj kaj epizodoj.* Vladimir Samodaj (1935). Moskvo: Impeto, 1999. 175p. ISBN 5 7161 0061 9. 22cm. Rememoroj de grava aganto de la sovetia E-movado. € 12,00.

Paŝoj al plena posedo. *Progresiga lernolibro de Esperanto kun lingvaj ekzercoj.* William Auld (1924). Pisa: Edistudio, 1999 (7-a, senŝanĝa eld.). 228p. ISBN 88 7036 071 7. 20cm. 30 legaĵoj kun ekzercoj. € 12,00.

75 jaroj. William Auld (1924). Intervjuis kaj redaktis Aleksander Korĵenkov. Jekaterinburg: Sezonoj, 1999. 47+8 fotopaĝoj. 20cm. Aŭtobiografio, trideko da poemoj, bibliografio. € 4,00.

Skizo de la Esperanta literaturo. Eduard V. Tvarožek (1920-99). Žilina: Slovakia E-Federacio, 1998. 92p. 21cm. Glu-bindita. Konciza konsultlibro, traktanta sian temon ĝis la 80-aj jaroj. € 7,80.

Gabrielle GACOND (1908-1999), subteninto de Kultura Centro E-ista kaj kunlaborinto de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, patrino de Claude Gacond, mortis la 21-an de aprilo en Neuchâtel (Svislando).

Kjell GUSTAVSEN (1915-99) mortis en Oslo (Norvegio) la 20-an de majo, unu tagon post sia 84-jariĝo. Ekkoninte E-on en 1950, li tuj propagandis ĝin en sia laborloko, la elektra centralo de Oslo. Dum multaj jaroj li oficis en la estraro de Norvega E-Ligo, kiel vicprezidanto (1966-77), prezidanto (1981-85), kasisto (1985-87) kaj estrarano (1987-93). Dum jardekoj li revizoris (1959-99) en Klubo E-ista en Oslo kaj estis vicprezidanto (1965-95) de Eldonejo E-ista. De 1976 ĝis la morto li servis kiel norvegia ĉefdelegito de UEA. Li insiste peradis petojn de interesatoj pri E-lingvaj broŝuroj al la norvega ministerio pri eksterio.

Sindikata aktivulo kaj iniciatinto de elektra muzeo en Oslo, li organize agadis ĉiam "proksime al la herboradikoj", opinante (laŭ vortoj de Otto Prytz) ke "Georgo la ĉapelisto same valoras kiel la reĝo Salomono".

Ken'iti MATUMOTO (1910-1999) forpasis la 4-an de aŭgusto en Berlino, dum la UK. Kasisto de la Tokia UK (1965), iama estrarano (1973-78) de Japana E-Instituto, li havis meritojn pri la nuna oficejo de JEI en la centro de Tokio. Li kunprizorgis la japanan parton de *Internacia komerca-ekonomika vortaro* de F. Munniksma (1990). Ofta vizitanto de Universalaj Kongresoj, li konstante membris en Societo Zamenhof kaj apogis la Novjorkan Oficejon de UEA.

Hemmo TIETTI (1911-1999), UEA-membro pli ol 50 jarojn, unu el la plej aktivaj e-istoj en Finnlando, forpasis la 20-an de majo en Somero. Laŭnaske germano (Helmuth Dibelius), li ĉiam sentis fortan ligon al Finnlando, kie li ekvivis dum la dua mondmilito. Li edziĝis



UEA-arkivo (E. Thorsson)

baldaŭ al Veera, lernantino de la E-vortaristo Joel Vilkki, kiun siatempe ĝuste Tietti konvinkis pri la avantaĝoj de E-o. Delegito de 1951 (pri parapsikologio, stenografio kaj naturprotektado), Tietti estis ankaŭ honora membro de E-Asocio de Finnlando. Li flegis specifajn rilatojn kun diverslandaj e-istoj, i.a. kun GBEGLO Koffi, nun UEA-estrarano, kiun li subtenis dum jardeko kvazaŭ adoptan filon. (Gbeglo fondis en Togolando, omaĝe al Hemmo Tietti, instituton kun lia nomo.)

Eduard V. TVAROŽEK (1920-1999), dumviva kaj de 1995 Honora Membro de UEA, forpasis la 9-an de aŭgusto en Trenčín (Slovakio).

Tvarožek naskiĝis la 13-an de majo 1920 en Horný Ďur. Malgraŭ diplomo pri filozofio, en la 50-aj jaroj li devis labori en briĉ-fabriko, post politika persekuto kaj jaroj da malliberigo. Poste li vivtenis sin ĝis emeritiĝo kiel industria tradukisto. Multflanka homo precipe lingvema kaj beletrama, li organizis literaturajn konkursojn en Slovakio.

Li ekkonis E-on kiel studento, entuziasme ekpropagandis ĝin kaj membriĝis al UEA jam en 1937. Unu el la malmultaj ĉeĥoslovakiaj delegitoj tra la "malvarmaj" 50-aj jaroj, li estis tiam eĉ komitatano de UEA. En pluraj urboj li instruis la lingvon, redaktis la revuon *Esperantisto Slovaka* (1947-51)



Arkivo de UEA

kaj, kiel vicprezidanto de Tutŝtata Konsulta Komitato E-ista (1955), luktis por la re-eblogo de E-agado. Li aŭtoris lernolibrojn por slovakoj (*Esperanto en 14 lecionoj*, 1950; *Základy Esperanta*, 3 eldonoj ĝis 1994), kaj verkis poezie, proze, didaktike kaj drame: i.a. *Niludas teatraĵojn* (kvar unuaktaĵoj, 1971), *Sola en sunsubiro* (poemaro, 1992), *Skizo de la Esperanta literaturo* (1998, vidu p. 159) kaj la kajerojn *Anekdotoj pri famaj homoj*, *Aforismoj*, *Frenezetaĵoj* kaj *Ŝercoj* (ĉiuj 1992). Li akiris plurajn premiojn en Belartaj Konkursoj. Tvarožek tradukis ne nur slovakajn verkojn al Esperanto (i.a. pli ol trionon de *Slovaka antologio*, 1977), sed ankaŭ publikigis tradukojn el aŭ helpe de Esperanto (*Ekspedicio Kon-Tiki* de T. Heyerdahl, 1955; *La profeto* de K. Ĝibran, 1971).

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ☐ kependerby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ☐ corsetti@iteldc.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ☐ lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ☐ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17.

Estrarano (kulturo kaj landa agado): s-ro Tacuo Hugiimoto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyōto, 606-8266, Japanio; ☎/✉ +81-75-711-45-58; ☐ jasu-k@mac.email.ne.jp.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ☐ Kalle.Kniivila@sydsvenskan.se.

Stelo-moneroj denove haveblaj!

Esperantistoj havis internacian monon jardekojn antaŭ la eŭro: en 1960 Universala Ligo eldonis serion da Stelo-moneroj. Tiuj unikaj numismatikaĵoj plu haveblas ĉe UEA.



★ **Kompleto de stelo-moneroj.** Kvar moneroj de 1, 5, 10 kaj 25 steloj. Vidu apartajn priskribojn ĉi-sekve. **Prezo: € 17,50**

★ **Monero de 1 stelo.** Bronza. Diametro 20mm., dikeco 1,5mm., pezo 3,4gr. Havebla nur en kompleto (vidu ĉi-supre).

★ **Monero de 5 steloj.** Latuna. Diametro 23,5mm., dikeco 1,7mm., pezo 5gr. **Prezo: € 1,50**

★ **Monero de 10 steloj.** Kupronikela. Diametro 28mm., dikeco 2mm., pezo 9gr. **Prezo: € 3,00**

★ **Monero de 25 steloj.** Arĝenta (90%). Diametro 38mm., dikeco 2,5mm., pezo 19gr. **Prezo: € 14,10**


Triona rabato ekde 3 ekz. de la sama monero aŭ de 3 kompletoj. Aldoniĝas 10% por aŭfranko kaj (por klientoj el Eŭropa Unio) 17,5% por imposto. Mendu ĉe UEA!



MULTKOLORA GLUMARKO IGAS VIAJN KOVERTOJN PARTOPRENI EN KAMPANJO 2000!

Prezo de folio (12 glumarkoj): € 1,35.
Triona rabato ekde 3 folioj.

Reaperis Paŝoj al plena posedo de Auld



La plej fama progresiga lerno-libro de Esperanto, per kiu ĉ. 20 000 esperantistoj perfektigis jam sian scion ekde 1968. Ĉi tiun 7-an eldonon prizorgis Edistudio (C.P. 213, IT-56100 Pisa, Italio; ☎ +39/50/48-670; ☎ /500-585; ✉ edistudio@sirius.pisa.it).

Mendebla ĉe la eldonejo, UEA aŭ ĉe naciaj libroservoj. Vendo-prezo: 12 eŭroj.

URBO LA ROCHELLE (FRANCIO) serĉas tutmonde la homojn (ties gefilojn ĝis foraj posteuloj), kiuj vivis aŭ naskiĝis tie. Bonvolu kontakti "Esperanto17", 4 rue Sophie Armant, FR-17000 La Rochelle aŭ <www.ville-larochelle.fr>; retpoŝte: <diaspora@ville-larochelle.fr>.

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu **patrono de TEJO**

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- TEJO tutmonde (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn.

Pionira vortaro por mondlingvo



KLARA VORTARO ESPERANTA-ARABA.
George Abraham. Rotterdam: UEA, 1998.
308p. ISBN 92 9017 056 5. 22cm.
Prezo: €13,70.

"Grava helpilo por komencantoj kaj progresintoj"
(Hugh Martin)

La araba estis la sola oficiala lingvo de UN kiu ĝis nun malhavis ampleksan Esperanto-vortaron. Jen la unua paŝo por forigi tiun mankon.

Klara vortaro Esperanta-araba rezultas el pli ol 30-jara pionira laboro. Ĝi estas klara, ĉar ĝiaj 15000 kapvortoj estas plejparte aranĝitaj laŭ la alfabeto ordo de la vortoj anstataŭ tiu de la radikoj.

GVIDILO PRI HOMAJ RAJTOJ

Okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj UEA eldonis tiun ĉi lernolibron de Unesco pri homaj rajtoj, aperintan antaŭe jam en 16 aliaj lingvoj. Leah Levin estas brita fakulo pri homaj rajtoj.

La unua parto de ŝia libro priskribas la internacian juron pri homaj rajtoj, kun multa atento al la evoluo de la proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj al la hom-rajta edukado. La dua parto klarigas la enhavon kaj signifon de ĉiu artikolo de la Universala Deklaracio. La modele tradukita kaj bele eldonita libro estas ilustrita de Plantu, fama franca karikaturisto.



HOMAJ RAJTOJ: DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ. Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm. Prezo: € 10,90.

NOVAĴOJ

de la eldona fako
de UEA


OMAGĖ AL AULD KAJ BOULTON

**LINGVA ARTO. JUBILEA LIBRO OMAĜE AL
WILLIAM AULD KAJ MARJORIE BOULTON.**


**Red. Vilmos Benczik. Rotterdam: UEA, 1999.
ISBN 92-9017-064-6. 5+217p. 21cm. Prezo: € 16,50.**

En 1999 William Auld kaj Marjorie Boulton festas sian 75-an datrevenon. Okaze de la jubileo UEA donacis al ili festlibron, en kiu pluraj kontribuantoj prilumas ilian verkistan karieron kaj analizas iliajn verkojn. Aliaj eseoj traktas aktualajn temojn de la movada kaj kultura vivo de Esperantujo.

Kontribuis V. Benczik, G. Berveling, W. Bormann, J. Camacho, P. Dašgupto, S. Fiedler, P. Gubbins, T. Huĝimoto, R. Jaderstrom, E. de Kock, A. Korĵenkov, Laŭlum, Mao Zifu, G. Mattos, S. Maul, A. Montagut, S. Pokrovskij, B. Ragnarsson, M. de Seabra, G. Silber, H. Tonkin, L. Trifončovski kaj J. Wells. Kun la bibliografioj de Auld kaj Boulton fare de C. Cimpa.



FILMO PRI VIVANTA LINGVO




ESPERANTO BUNTE VIVAS. Vidbendo. Foris Productions. Rotterdam: UEA, 1999. VHS/PAL. 28 min. Prezo: € 24,60.

Esperanto-versio de la filmo pri la Montpeliera UK, kies franca originalo estis celita al ne-esperantista publiko. Intervjuoj kun gekongresanoj kaj scenoj el la programo de la UK bildigas la tutmondecon de la vivanta lingvo Esperanto.

PRAGA MANIFESTO PROFUNDE

KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS. Red. O. Buller kaj R. Corsetti. Rotterdam: UEA, 1999. ISBN 92 9017 061 1. 24p. 30cm. Prezo: € 5,50.

Studkajero pri la temoj de la Manifesto de Prago: demokratio, transnacia edukado, pedagogia efikeco de Esperanto, plurlingveco, lingvaj rajtoj, lingva diverseco kaj homa emancipiĝo.



KAJ PLIE...

INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO 1999. Red. M. Lipari. Plena prelegaro de IKU en la Berlina UK. 81p. 30cm. Prezo: € 7,80.

ĈIUJ KUNE. Aktoj de la 1-a kunsido de la Strategia Forumo de la Esperanto-komunumo, Montpeliero 1998. 20p. 21cm. Prezo: € 2,15.

SPIRITO DE ESPERANTO KAJ LA "SAMIDEANAJ" MALAMIKAĴOJ. Ignat Bociort. Premiita eseo. 12p. 21cm. Prezo: € 1,50.

TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Telefono: +31 10 436 1044 Telefakso: +31 10 436 1751 Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>